

8-9

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

AUGUSTO — SEPTEMBRO 1963



E N H A V O

	Paĝo
* * * Brila kongeso — favoraj postsekvoj	1
Violin Oljanov. La 48-a finiĝis plensukcese	2
Tinka Lakova. III konferenco de la mondpaca esperantista movado	8
* * * 19-a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso en Vraca	9
* * * 40-a datreveno de la Septembra Ribelo en 1923	16
Geo Mliev. El la poemo „Septembro“	16
Georgi Karaslovov. Ĥristo Smirnenski	17
Ĥristo Smirnenski. La ribelo de Vezuvo	17
Ĥristo Smirnenski. Moskvo	19
Ĥristo Radevski. Ĉe la tombo de Ĥristo Smirnenski	19
Zora Mladenova-Hans. Agrable kaj utile	20
Atanas D. Atanasov-ADA. Dudeka leciono	22
Atanas D. Atanasov-ADA. Dudekunua leciono	24
Ivan Draganov. Kora kaj inda celebrado	26
* * * Kongreso kaj gazetaro	27
* * * Dekoraciitaj esperantistoj	28
* * * Al la malnovaj esperantistoj	29
* * * Adresaro de la Esperanto-societoj en Bulgario	30
Postkongresa laboro en Loveĉ	32
Imitinda laboro	32
Montodomo „Esperanto“	32
Humoraĵoj	32

Abonkoto: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



BRILA KONGRESO — FAVORAJ POSTSEKVOJ

La 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio pro sia grandiozezo, amasa partopreno de pli ol 3400 geesperantistoj el 45 landoj de la 5 kontinentoj kaj la plenumita varia programo restos por ĉiam en la historio de la Esperanto-movado kiel unu el la plej sukcesintaj postmilitaj kongresoj. La antikva Sofio — la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario kore kaj varme akceptis la karajn gastojn.

Dum la kongresaj tagoj en la kongresejo, tra stratoj kaj parkoj, en hoteloj kaj restoracioj senĉese sonis melodia Esperanto-parolo. La bulgaraj esperantistoj, la sofianoj kaj la tuta bulgara popolo montris sian naturan, senperan gastamon kaj afablecon.

Estas malfacile esprimi kiu aranĝo kaj aktiveco de la kongreso pleje sukcesis. Sed kun certeco oni povas aserti, kaj tio estas la ĝenerala opinio de la kongresanaro, ke la 48-a estis vere impona, saturita per riĉa enhavo, montranta la pluan ĝustan kaj sukcesan disvolviĝon de nia movado plifortiganta ĝian nunecon en la kadroj de nia sole reprezenta internacia organizaĵo Universala Esperanto-Asocio, elmontro de la plej noblaj aspiroj kaj strebado de la esperantistoj el tutmondo por frata interkompreniĝo de la popoloj.

Malgraŭ la naciaj, rasaj, politikaj kaj religiaj diferencoj de la kongresanoj la diversaj aranĝoj pasis en spirito de komprenemo, toleremo kaj lojaleco. Grava signo de tiu kongreso estis la fakto, ke en ĝi partoprenis ankaŭ esperantistoj el landoj, kiuj neniam estis reprezentitaj ĉe Universalaj kongresoj aŭ ne sendis delegitojn dum la lastaj kelkaj jaroj kiel Sovetunio, Hispanio, Greklando, Mongolio, Malio, Gvineo k. a. Tio montras ke organizo de Universala kongreso de tempo al tempo en orienta lando havas gravan avantaĝon.

Sendube, por la amikeca kaj intima atmosfero en kiu fluis la tuta kongresa laboro multon kontribuis la mildigo de la internacia atmosfero rezulte de la subskribo de la kontrakto por malpermeso de la eksperimentoj kun nukleaj bomboj en la atmosfero, la kosmo kaj sub la akvo, fare de la tri grandaj potencoj — Sovetunio, Usono kaj Britlando.

La laboro kaj la sukceso de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio estas vojomontriloj por la triumfa marŝo de la Zamenhofa lingvo tra la tuta mondo. Ni utiligu la bonajn rezultojn por tuja pliaktiviĝo de ĉiuj societoj kaj esperantistoj. Tuj ni faru propagandajn semajnojn kaj malfermu kursojn. La grundo estas fekundigita, ni jetu bonajn semojn por ricevi abundajn fruktojn!


LA 48-A FINIĜIS PLENSUKCESE

Impona kongreso

Tia estas la ĝenerala pritakso de la lasta universala kongreso okazinta en la bulgara ĉefurbo. Pli ol 3400 gekongresanoj el 45 landoj! Ja tio estas la plej granda kongreso post la dua mondmilito? Ja tio estas la plej reprezenta kongreso en la historio de la tutmonda Esperanto-movado! Ja tio estis la plej rimarkinda internacia aranĝo, kiu okazis kiam ajn en nia lando! Unuan fojon estis reprezentitaj kelkaj afrikaj landoj. Tio estas reflektado de la liberiga proceso kiu okazas dum la lastaj jaroj en tiu kontinento. Tio estas nova periodo ankaŭ en nia movado. Alia grava trajto de la ĉi-jara kongreso estas la amasa partopreno de la sovetiaj esperantistoj. Kiel longe ni revis pri tiu renkontiĝo.

Nova trajto de la universala kongreso estas la spontanea alvoko al batalo por paco. Tio estis la baza penso preskaŭ de ĉiuj salutintoj dum la solena inaŭguro. La 48-a UK montris maturiĝon tiurilate.

Granda estis la ĝuo de la kongresanoj en la bulgara ĉefurbo: freŝa aero, montara pejzaĝo, verdaj bulvaroj, refreŝigaj parkoj, gastama popolo. Ja en neniu alia kongreso okazis tiel multe da renkontiĝoj kun lokaj sociaj medioj, tiom da regaloj, tiom da donacoj, tiom da amikaj konversacioj, tiom da ŝprucoj de fratecaj sentoj, tiom da esprimoj de la ĝenerala volo de la popoloj por paca kunvivado kaj amikaj interrilatoj. Unuan fojon tiel substrekite la oficialaj reprezentantoj de la landaj asocioj kaj de la esperantistoj, kie ne ekzistas asocioj, esprimis la volon de la esperantistaro labori per Esperanto por la tutmonda paco.



La Kongresejo

Tre kontentaj estis la kongresanoj pri la senpagaj kartoj por la urba veturilaro. Ĝi estis ankaŭ unika manifestiĝo de la gastiganta urbo dum niaj universallaj kongresoj. Ĝi ege faciligis la eksterlandajn esperantistojn en nekonata lando kaj urbo. Pri tio ni ne foje ricevis la dankon.

Solena inaŭguro

Ĝi okazis la 4-an de aŭgusto je la 9,50 horo en la halego „Universiado“. La ŝtata ĥoro „Svetoslav Obretenov“ ĝin malfermis per „La Espero“. La prezidanto de UEA profesoro Hideo Jagi deklaras la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto malfermita kaj dankas al la Honora Protektanto de la

kongreso pri lia ĉeesto. Li dankas ankaŭ al LKK, kiu sukcesis organizi tian grandan kongreson. Li direktas dankajn vortojn ankaŭ al urbo Sofio. „Revuo „Nuntempa Bulgario“ estas la plej bela kaj luksa revuo“, deklaris s-ro Jagi. „Ni gratulas la bulgarajn esperantistojn. Ni esperas ke la kongreso en Sofio estiĝos mejloŝtono en la historio de la Esperanto-movado“.

En la nomo de la Infana Kongreseto salutis la kongreson Maria Bubeva el Bulgario. Eksonas fanfaroj. El ĉiuj pordegoj eniras kun kantoj kelkcentoj da bulgaraj infanoj en multkoloraj popolaj kostumoj. Fulmas la fotoaparatoj, murmuras la kinokameroj. Sublima momento. La infanoj per hora deklamado salutas la kongreson.

La prezidanto de LKK salutis la kongresanojn per „bonan venon“. Li donis iujn statistikajn informojn pri la konsisto de la kongresanaro. La vicprezidanto de UEA H. Holms (Holmes) respondis al Aleksiev, dankante al LKK. „Mi estas tiel kortuŝita pro la saluto de la infanoj“, diris li, „ke mi ne povas paroli. Tio estas la plej granda kaj unu el la plej belaj niaj kongresoj“.

En la nomo de la bulgara registaro faris salutparoladon la unua vicprezidanto de la ministraro Georgi Trajkov. „Permesu al mi“, li komencis, „en la nomo de la registaro de Popola Respubliko Bulgario kaj de la bulgara popolo kaj en mia nomo saluti plej kore la partoprenantojn en la 48-a Universala Kongreso de Esperanto kaj bondeziri utilan laboron. Tiu ĉi kongreso estas konsiderinda evento en la vivo kaj la agado de UEA, kiu havas la noblan taskon strebi senlace kaj kontribui al la alte humana batalo por intimiĝo, interkompreno kaj krea kunlaborado inter la popoloj kaj la laboruloj de ĉiuj landoj sen konsidero pri politika, religia kaj rasa aparteno“. Georgi Trajkov plue atentigis pri la konside-

rindaj sukcesoj de nia popolo dum la lastaj 19 jaroj en la politika, la ekonomia kaj la kultura vivo. Li karakterizis la kontrakton inter Sovetunio, Usono kaj Britio pri malpermeso de la atomeksperimentoj en la atmosfero, en la kosma spaco kaj sub la akvo kiel brillan venkon de la paca kunekzistado. Li finis sian paroladon per la jenaj vortoj: „Karaj esperantistoj, nia popolo estus aparte ĝoja, se vi forportos en viaj koroj belajn rememorojn pri la tagoj, pasigitaj ĉe ni, pri viaj renkontiĝoj kun ĝi, pri tio kion ĝi faris en la konstruado de la nova vivo. Mi ne dubas, ke multaj el vi, ekkoninte la belecon de nia patrolando, ĝuinte la bulgaran gastamecon, ekdeziros alifoje reveni al ni — ripozi en agrablaj kondiĉoj ĉe la maro aŭ en montaro akceptataj kore kiel fare de siaj amikoj — la esperantistoj, tiel same de la ceteraj bulgaraj civitanoj“.



S-ro Vensing dankas

Dankvortojn al Georgi Trajkov direktis la vicprezidanto de UEA E. Vensing. Interalie li diris: „Sinceran dankon al vi, al la nacio, kiu tiel impone nin gastigas. La 48-a vivos plu, kiel plej granda manifestado de la internacia lingvo“.

Post tio la ŝtata ĥoro „Svetoslav Obretenov“, konsistanta el 90 gekan-

tistoj, en popolaj kostumoj plenumis dekmintan programon.

Salutis la kongreson reprezentantoj de la registaroj de Aŭstrio, Belgio, Hungario, Israelo, Mongolio, Nederlando, Nov-Zelando kaj Svedio. En la nomo de la Tutmonda Federacio de la Sciencistoj salutis la bulgara sciencisto Kiril Bratanov. La direktorino de la Centra Oficejo de UEA M. Vermaas tralegis iujn el la ricevitaĵaj salut-telegramoj, post kio salutis la kongreson la reprezentantoj de la landaj asocioj kaj organizaĵoj. Fine la Prezidanto de la Esperanta Akademio Gaston Varingien (Waringhien) faris la festparoladon, kies temo estis la kongreslando Bulgario kaj ĝia Esperanto-movado.

La komitato de UEA

Ĝi havis kvin kunsidojn. La tagordo — abunda. Inter la pli gravaj punktoj ni menciuj: ĝenerala diskuto pri la estrara raporto; aprobo de la buĝeto por la jaro 1964, raporto de la komisiono por la laborplano; raporto de la komisiono pri la lernejoj, propono de la estraro pri elektoj en 1964.

Oni elektis komisionojn pri la financoj, pri la laborplano de UEA, pri kampanjoj, pri lernejoj. El la bulgaroj eniris la komisionon pri la laborplano la komitatano V. Oljanov.

La komitato decidis mallongigi sian mandaton ĝis la venontjara kongreso en Hago, ĉar en Tokio verŝajne ne multaj povos ĉeesti.

Oni elektis komisionon kun tasko esplori la membro-sistemon de UEA. Ĝi konsistas el: A. Sekelj (Jugoslavio), J. Gjujom (Guillaume) (Francio) kaj V. Oljanov (Bulgario).

La komitato sugestas, ke la ekzamina komisiono mildigu la kriterion de ekzameno rilate al la historio, evitante demandojn pri ne esencaj datoj kaj nomoj, kiuj ne ludis esencan rolon en la historio de la movado.

La komitato substrekas la neceson de speciala lernolibro por Afriko.

Oni akceptis la raporton de la komisiono pri la kampanjoj kaj ĝin transdonis al la estraro por pristudo.

Oni plialtigis la membrotizojn por asociaj membroj de 0,25 ned. gld. al 0,50 gld., de individuaj membroj — de 15 al 20 gld.

Oni akceptis la raportojn de la financa kaj la lerneja komisionoj kaj la kongresan rezolucion.

Krome la komitato decidis:

a) rekomendi eldonon de nova Esperanta Enciklopedio;

b) konsideri iniciaton kaj helpon al regionaj renkontiĝoj dum la jaro 1965, ĉar al la kongreso en Tokio malmultaj eŭropanoj povos vojaĝi;

c) klopodi malaltigi la abonprezon de „Monda Kulturo“ per plialtigo de la eldonkvanto kaj havigo de pagitaj anoncoj;

d) krom la internacia teatro helpi ankaŭ la diverslandajn teatrojn;

e) plinombri la konsiston de la juĝkomisionoj pri belartaj kaj oratoraj konkursoj per membroj el diversaj regionoj de la mondo (kaŭzo pri tiu ĉi decido estis la malkontento pri la prijuĝo de la komisiono pri la oratora konkurso en Vraca, ke tiuj komisionoj estu pli reprezentaj kaj pli aŭtoritataj).

f) prikonsideri la rezultojn de la Internacia Konferenco de la Lernejoj, en kiuj estas instruata Esperanto kaj subteni la klopodojn koncerne enkondukon kaj instruadon de Esperanto en lernejoj.

Ĉi-jare la kunsidoj de la komitato pasis ilue kaj malformalece, konkrete. Sed bedaŭrinde la komitatanoj fakte ne povas partopreni la ceterajn aranĝojn de la kongreso. Kaj ili ja estas la gvidantoj, ili devas esti meze de la esperantistaro. Ĉu ne eblas, ke la komitato finu sian bazan laboron vendrede kaj sabate antaŭ la komenciĝo de la kongreso kaj nur se en tiu tempo ne finiĝus la tagordo oni faru ankoraŭ unu kunsidon en la kongressemajno, sed nur en tia tempo, kiam ne estas amasaj kongresaj aranĝoj.



Prof. Bokarev salutas

Ĝeneralaj kunvenoj

Okazis du ĝeneralaj kunvenoj de UEA. La unua okazis la 5-an de aŭgusto kaj konsistis el du partoj. En la unua faris salutparolojn reprezentantoj de fakaj organizaĵoj. La dua parto estis dediĉita al la internacia lingvo Esperanto kaj la hodiaŭa junularo kaj estis gvidata de la prezidanto de TEJO Gjunter Beker. La vicprezidanto de TEJO Simeon Simeonov raportis koncize pri la laboro de la 19-a TEJO-Kongreso en Vraca.

Pri la kultura laboro de la junaj esperantistoj kaj pri la laboro inter la lernantoj parolis Slobodan Zlatnar. Substrekita estis la signifo de la junulara Esperanto-gazeto „Kontakto“, kiu ludos gravan rolon por la pliiintimigo de la gejunuloj de ĉiuj landoj. Fine la prezidanto Beker alvokis la junajn esperantistojn krei naciajn grupojn en ĉiuj landoj kaj starigi kontakton kun la estraro de TEJO.

La dua ĝenerala kunveno okazis la 9-an de aŭgusto sub la prezido de la viceprezidanto de UEA Holms. Oni pridiskutis la raporton de la estraro de UEA pri la agadjaro 1962/63. El BEA en la diskutoj partoprenis N. Aleksiev, V. Oljanov k. a. En la dua punkto oni raportis pri la laboro de la fakkunsidoj.

Fakkunsidoj

Estas ne facile skribi pri ili. Ĉiujare ties nombro pligrandiĝas. Esperanto senŝancele eniras en ĉiujn sferojn de la vivo. Dum la 48-a okazis fakkunsidoj de la instruistoj, de la veteranoj, de la junularo, de la Universala Ligo, de la geografoj, de MEM, de Rotarianoj, de la sciencistoj, de la blinduloj, de la Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, de la redaktoroj de Esperanto-gazetoj, de la arkitektoj kaj konstruistoj, de la medicinistoj, de la virinoj, de la fervojistoj, de la juristoj, de la ĵurnalistoj k. a. Ili ĉiuj pridiskutis la agadon de la fakaj asocioj kaj la staton de la disvastiĝo de Esperanto en la koncernaj medioj kaj akceptis decidajn pri plibonigo de sia agado.



La medicinistoj kunsidas

Festivalo, akceptoj kaj aliaj arangoj

Oni sen hezito povas konkludi ke la Dua Internacia Arta Festivalo plensukcesis kaj pasis je alta nivelo. Teatraĵoj, estradaj vesperoj, ekspozicioj, konkursoj — ĉio estis tiel abunda kaj riĉa, ke ĝi donis ĉarman koloron al la tuta kongreso. Aparte plaĉis al la publiko la ludo de la Bulgara Esperanto-Teatro, kiu prezentis „Komedio de eraroj“ de Ŝekspiro. Grandan intereson vekis la bulgara arta vespero. Multajn aplaŭdojn ricevis la popolaj dancoj de di-

La prelegoj de la Internacia Somera Universitato okazis en la plej granda halo de la kongresejo — „Zamenhof“. La intereso al ili estis granda, aparte al „Rezultoj de permaŝina tradukado el la rusa lingvo en Esperanton“ de B.

Fortan impreson faris la multaj akceptoj de kongresanoj fare de oficialuloj. Antaŭ ĉio ni menciis la akcepton de la urbestro kaj la persona ceesto kaj saluto al la kongresanoj de la unua vicĉefurbestro V. Krăstin. La abunda regala plialtigis la humoron kaj la festeno pasis en amika atmosfero. Bedaŭrinde parto de la kongresanoj ne komprenis, ke tiu ĉi akcepto rilatas pri ĉiuj kongresanoj. Krom la buŝaj sciigoj oni devis meti en kelkajn lokojn de la kongresejo ankaŭ skribitajn avizojn. Same bone pasis la akcepto de la instruistoj fare de la Ministro de la Klerigo, de la ĵurnalistoj en la Asocio de la Bulgaraj Ĵurnalistoj, de la sciencistoj, de la virinoj, de la medicinistoj ktp. La eksterlandaj esperantistoj estis admiritaj de la populareco de la bulgaraj esperantistoj en diversaj fakaj medioj kaj plej superaj institucioj de la lando.



Kolker, al „La ellaborado de Esperanta leksikologio“ de Prof. G. Varingien, „Evoluo de la bulgara literaturo“ de Prof. P. Dinekov, „Metaforoj, kliŝoj kaj slangoj“ de M. Bulton k. a.

La premiojn de la oratora konkurso ricevis S. Svistak (Pollando), Kiotaro Deguči (Japanio), Dikon Masterman (Britio).

Balo okazis en la halego Universiada, kie la kongresanoj pasigis ĝis malfrua nokto. Dancoj, amuzoj, ĝajaj interparoloj inter malnovaj kaj novaj



6

La 10-an de aŭgusto lastan fojon la gekongresanoj kunvenis en „Universiada“. La humoro estas festa. Ja la farita laboro estas bona. La prezidanto de UEA Prof. Hideo Jagi malfermis la Ferman Kunsidon. Li direktis vortojn de elkora danko al la bulgara registaro, al la bulgara popolo, kiuj kontribuis por la brila sukceso de la 48-a UK. La vicprezidanto de UEA H. Holms (Holmes) raportis pri la decidoj de la Komitato de UEA kaj pri la akceptita rezolucio.

Post tio oni deklaris la premiitojn de la konkursoj.

La parolon havas la prezidanto de LKK Nikola Aleksiev. „Ni estos kontentaj, — diris li, — se ĉiuj partoprenantoj en la kongreso forportos bonajn rememorojn pri la farita laboro, pri la pasigita tempo en nia lando“. „La 48-a Universala Kongreso de Esperanto, — daŭrigis li, — pliiintimigis la homojn en la nomo de la grandaj celoj de nia epoko kaj de la tuta homaro — paca kunekzistado de ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj, solvado de in-



Infana Kongreseto

terŝtataj disputoj per paca vojo, interŝanĝo de kulturaj valoroj inter Okcidento kaj Oriento, estiĝo de daŭra paco sur la tuta terĝlobo kaj forigo de la milito el la interŝtataj rilatoj“. Fine Aleksiev transdonis la kongresan standardon al la reprezentanto de la nederlandaj esperantistoj kiuj estos dommastroj de la 49-a UK. S-ino Kervers, vicprezidentino de la Nederlanda Esperantista Asocio, emocie parolis pri la varmeko kaj la koreco, per kiu estis ĉirkaŭitaj ĉiuj esperantistoj, alvenintaj en Bulgario por la 48-a. „La bulgara popolo, — diris ŝi — gajnis por ĉiam niajn korojn“.

La kongreso finiĝis. Ĉiuj ekstaras kaj ekkantas „La Espero“-n. Sed longe la gekongresanoj ne disiras. Lastaj interparoloj, promesoj por nova renkonto en Hago, manpremoj, brakumoj.

Ĝis revido en Hago! . . .

Plusoj kaj minusoj

La impresoj estas bonegaj. Preskaŭ ĉiuj estas ravitaj pro tiu granda organiza laboro, kiun faris LKK. La kongreso estas plensukcesa. Ĝi havas grandan propagandan efikon en nia lando.



N. Rytikov gratulas la artistojn

Ĉu ni sukcesos bone utiligi tiun efikon por nia antaŭstaranta laboro dum la aŭtuno? Sed ekzistis ankaŭ seriozaj mankoj, kiujn ni ne devus prisilenti. Iuj el ili nature ŝuldiĝas al la tro granda nombro de kongresanoj kaj precipe al la aliĝintoj en la lasta momento. Sed estis ankaŭ mankoj en la organiza laboro de LKK mem. Tiaj mankoj evidentiĝis en la laboro de la loĝiga ser-

vo, en la ekskursoj, en la ĝiĉetoj, en la festivalo.

* * *

La plej granda okazaĵo en la historio de la bulgara Esperanto-movado jam pasis. Ĉi bone fekundigis la grundon de nia Esperanto-agro. Nun ni devas semi por kolekti la fruktojn de nia laboro.

Violin Oljanov

III KONFERENCO DE LA MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

En la kadro de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto okazis la III MEM-konferenco. La 3-an de aŭgusto posttagmeze okazis la solena malfermo. Ĉeestis pli ol 500 geesperantistoj-pac batalantoj.

Per mallonga parolado la ĝisnuna prezidanto de MEM Canko Murgin malfermis la solenan kunvenon. Unua faris salutparoladon akademiano Georgi Naĝakov, prezidanto de la Bulgara Nacia Packomitato kaj membro de la Tutmonda Packonsilantaro. Li prelegis pri la aktualaj taskoj de la batalantoj por paco, substrekante ilian noblan laboron kaj la grandajn sukcesojn de la pacbatalantoj. Li emfazis ankaŭ la grandajn antaŭstarantajn taskojn por la fina venko de la paco. La raporto de Georgi Naĝakov estis akceptita per brua aplaŭdoj. Postela sekretario de MEM A. Balague raportis pri la 4-jara periodo inter la II kaj la III konferencoj. Li parolis pri sia laboro kaj pri la agado de la komitato elektita dum la II MEM-konferenco en Varsovio en 1959. Li menciis la atingaĵojn kaj la mankojn de nia movado kaj substrekis la gravecon de la III MEM-konferenco, kiu devas marki la vojon por la estonta agado de MEM — akcepti la statuton kaj la regularon kaj elekti novan MEM-Komitaton.

Ĝojiga fakto estis, ke la konferencon partoprenis ankaŭ Soveta delegitaro. Je la nomo de la sovetaj geesperantistoj faris salutparoladon S. Miĥajlov, post kio la unua kunsido estis fermita. La bulgaraj MEM-anoj invitis la gastojn viziti la maŭzoleon de Georgi Dimitrov. Kelkcentoj da geesperantistoj partoprenis la procesion kaj tiamaniare esprimis sian estimon al la granda batalanto por paco, al la heroo de Leipzig Georgi Dimitrov.

La dua kunveno de MEM okazis la 4-an de aŭgusto je la 15-a h. Kolektiĝis pli ol 300 MEM-anoj. Oni daŭrigis la salutparoladojn kaj la raportojn de la reprezentantoj de la landaj MEM-sekcioj, per kiuj la MEM-aktivuloj montris gravajn sukcesojn kaj mankojn dum la raportita periodo. En tiu kunveno estis voĉdonitaj saluttelegramoj al la grandaj ŝtatoj Hruŝčov, Kenedi kaj Makmilan okaze la subskribon de la kontrakto pri ĉesigo de la eksperimentoj kun nukleaj armiloj en la atmosfero, en la kosmo kaj sub la akvo. Estis akceptita ankaŭ telegramo al la Tutmonda Packonsilantaro.

Dum la III-a kunveno oni pritraktis la projektostatuton. Oni povis vidi ke ĉiuj parolantoj havis sinceran deziron montri plej konvenan kaj taŭgan vojon por la estonta agado de MEM. La statuto estis akceptita kun kelkaj ŝanĝoj kiel fundamentan gvidilon de MEM ĝis la venonta konferenco. Estis akceptita ankaŭ la regularo por la komisionoj. Kaj fine oni elektis novan MEM-Komitati-

on: Prezidanto de MEM — Nikola Aleksiev el Bulgario, ĝenerala sekretario — A. Balague — Aŭstrio, kaj ĉefredaktoro — Holmkvist el Svedio.

Jam aperis „Paktivulo“, kie estas presitaj materialoj de la III MEM-konferenco.

Komencigas nova periodo de nia laboro jam en pli bonaj internaciaj cirkonstancoj post la subskribo de la kontrakto inter la tri grandaj potencoj. Ni esperu ke ĝi estas la unua paŝo al pli bona interkompreniĝo de la homoj el Oriento kaj Okcidento, al sukceso de la batalo pri kompl-ta senarmigado kaj daŭra paco en la mondo.

Kaj ni per nia riĉa sperto, per nia korespondado kaj internaciaj renkontiĝoj donu nian kontribuon al tiu ĉi nobla batalo estante ĉiam en la unuaj vicoj de la pachtalantoj.

Vivu Esperanto je servo de la paco!

Tinka Lakova

19-A INTERNACIA JUNULARA ESPERANTO-KONGRESO EN VRACA

La unua impresado de ĉiu kongresano en Vraca sendube estis la vere abunda prikongresa kaj priesperanta ornamado. Ĝi superŝutis ĉiujn stratojn kaj placojn, preskaŭ ĉiun montrofenestron de la butikoj sur la ĉefaj stratoj. En neniuj urbo ĝis nun TEJO-kongreso estis akceptita similmaniere. Tion konstatis interalie ankaŭ la Prezidanto de TEJO — S-ro Günther Becker dum la gazetara konferenco organizita vendrede la 28. VII. La konferencon ĉeestis ĉiuj ĝis la momento alvenintaj estraranoj de TEJO kaj ĉiuj distriktaj korespondantoj de la gazetoj kaj la radio. Post ĝi multaj gazetoj raportis tre favore, la loka radio-servo disaŭdigis 15-minutan programon kaj la loka gazeto dediĉis al la kongreso du kompletajn paĝojn en sia sabata eldono.

La unua pli granda grupo da kongresanoj alvenis en la nokto antaŭ sabato. La laciĝo de la plurtaga veturado fermas la okulojn de niaj gastoj, la longa deĵorado kaj la lastaj streĉaj antaŭprearoj influas ankaŭ nian humoron, tamen ĉu oni povas dormi kiam alvenas karaj amikoj, kiujn vi ne vidis

dum tuta jaro aŭ eĉ pli. Ĉirkaŭprenoj, brakumoj kaj kisoj . . . kisoj sennombraj. La aŭtobuso transportas la viglan popolon ĝis la komuna loĝejo aranĝita en la loka teksa lernejo. Tio estis tamen la unua grupo. Ankoraŭ kelkaj tagoj, preskaŭ dum la tuta kongresa semajno alvenadis kongresanoj. Tial la deĵorantoj ĉe la stacidomo, plejparte lernantoj el Vraca, oferis plurajn horojn, rezignis pri interesaj kongresaj programoj, sed restis sur sia posteno por helpi la alvenantajn gastojn.

La flagoj de la 22 reprezentitaj nacioj flirtas en la suna mateno kontraŭ la kongresejo. Apud ili grandaj verdaj standardoj jetas ombbron super la kapoj de la kolektiĝantaj gekongresanoj.

La granda salono de la kongresejo estas plena ĝis sia lasta sidloko. Per kelkaj enkondukaj vortoj la Prezidanto de la Kongresa komitato — S. Simeonov emfazas la karakteron de la kongreso kaj la rolon de ĉiu unuopa partoprenanto por ĝia sukceso. Li donas la parolon al la Prezidanto de TEJO — S-ro G. Becker, kiu deklaras la 19-an TEJO-kongreson malfermita.



La prezidantaro de TEJO-Kongreso

En sia salutparolado la Honora Protektanto de la kongreso, la ministro de klerigo de P.R. Bulgario Gaŉo Ganev aparte substrekiis la tradiciojn de la bulgara kleriga sistemo pri fakultativa instruado de Esperanto en la lernejoj kaj la tute lastaj decidoj pri simila instruado en kelkaj altlernejoj. Salutis la kongreson ankaŭ la Sekretario de C. K. de Junulara Asocio en Bulgario G. Atanasov, la Urbestro Ljudmil Janĉev, kiu tiel larĝanime helpis ĉe la antaŭpreparo de la kongreso, la Sekretario de BEA Violin Oljanov kaj la ĉeestanta observanto de la Monda Federacio de la Demokrata Junularo — S-ro Robert Pinel. Sekvis la kutimaj salutoj de la reprezentantoj de la landaj sekcioj de TEJO kaj de la landoj sen organizita junulara movado. Por unua fojo la kongreson salutis ankaŭ esperantistino el Sovetunio. Aparte kortuŝa momento estis tiu, kiam subite la salonon eniris kun vigla kanto granda grupo da junpioniroj, kiuj en versoj salutis la kongreson kaj kovris la prezidantaron per buntaj bukedoj de floroj. En la fino de tiu impona solenaĵo, la kongresanojn alparolis S-ro Humphrey Tonkin — estrarano de TEJO, kiu faris la kutiman festparoladon. En ĝi li emfazis la nu-

nan pozicion de la junulara Esp. — movado, ĝiajn atingojn tute speciale dum la lasta jaro — la jaro de la junularo kaj la plej gravajn taskojn por la estonto, kun aparta konsidero de la rolo de la nova gazeto por junuloj — „Kon-takto“. La solena inaŭguro finiĝis per la komuna fotografiĝo, kiu pro la granda nombro da kongresanoj, kreis ĉi jare multajn zorgojn por la organizantoj.

En la vespero la kongresanoj ĉeestis, kune kun junuloj kaj civitanoj, la internacian balon — venecian vesperon en la subĉiela restoracio „Vratcata“, situita en loko aparte pitoreska inter la rokoj de la pasejo kun sama nomo. Estis vere mirinda spektaklo, kiam la multkoloraj artfajraĵoj lumigis la rokojn kaj inter ili rezonadis iliaj tondregoj, miksigantaj kun la muziko kaj junularido. Subite sur la insulo meze de la lageto aperas muzikisto en nacia kostumo. Tiam multaj preferis forlasi la dancejon por ĝui tiun vere unikan spektaklon.

La lunda mateno estis dediĉita al la sportaj konkursoj, kiuj okazis en la urba stadiono. Eĉ la varma suno kaŝiĝis malantaŭ la nuboj por ne ĝeni la konkursantojn. Plej multajn sukcesojn



C. Beker paroias

ĉe la viroj havis T. Kalengiev el Bulgario (Ruse), dum ĉe la kurado inter la virinoj gajnis Trude Dusterhaus el GFR. En la rapidega turniro pri tabloteniso plej lerta sin prezentis lan Davison el Skotlando. Tamen sendube plej grandan ĝuon por la spektantoj vekis la futbalmaĉo inter bulgara teamo (el Ruse) kaj germana teamo. Cetere en tiu lasta gravan rolon ludis interalie la prezidanto de TEJO, ne por garantii pli da poentoj al sia teamo, sed precipe por ridigi la publikon.



Junulara Sporta Ludo

En la vespero de la sama tago okazis publika renkonto de la esperantistoj kun la loka junularo sur la placo Ĥr. Botev. Parolis la Sekretario de la Urba komitato de la Junularo — Iv. Dimitrov kaj E. Slavejkova — teksa laboristino. El la gastoj alparolis la publikon: John Wells — Britio, Yoshimi Umeda — Japanio, Rudolf Burmeister — GDR, Ibrahim Tambura — Malio, Carlo Minnaja — Italio kaj Jean Thomas — Francio. La baza penso en ĉiu parolaĉo estis la paco kaj la amikeco inter la tutmonda junularo, tiuj samaj vortoj, kiuj estis legeblaj en Esperanto super la podio. La mitingon kompletigis interesaj folkloraj programeroj, kantoj kaj dancoj.

En la malfrua vespero atendis la kongresanojn ankoraŭ unu interesa aranĝo, nome la oficiala akcepto de la Urbestro. Regis natura atmosfero, en kiu la simpatia urbestro povis kanti bulgaran popolkanton kaj la kongresanoj diligente provadis la paŝojn de bulgaraj popoldancoj. Je la sekvonta tago staris en la programo vizito de teksa fabriko.

La teksa fabriko apud Vraca estas tute nova, ekipita per modernaj maŝinoj, parto de kiuj en la momento estas muntataj. Post rapida trarigardo de la laborejoj kelkdekoj de la gastoj estis akceptitaj de la fabrika estraro, kiam oni donis ankoraŭ pli detalajn klarigojn pri la tuta produkta procedo kaj laborkondiĉoj de la laboristoj. Nederlandano interesiĝas pri la daŭro de la laborsemano kaj pri la purigado de la aero; belgo — pri la sistemo de pagado; jugoslavo pri la sistemo de pensiigo. Al ĉiuj demandoj detale respondis la ĉefingeniero A. Veliĉkov.

La posttagmezo estis dediĉita al la duontaga ekskurso al „Ledenika“. Malrapide antaŭeniris la dektri aŭtobusoj sur la serpentumanta vojo, tamen vere mirinda pejzaĝo malkovriĝis de supro. En la groto, plenrajte portanta la nomon „Ledenika“ (la glaciejo) nur povis eniri grupoj po kelkdekoj da personoj.



La junuloj en la stadiono

Malgraŭ tio verŝajne neniam ĝi vidis tiom multnombrian vizitantaron kaj en kelkaj lokoj aparte mallargaj iuj personoj (divenu la nomojn) eĉ komplete ŝtopis la cirkuladon. Sed kia surprizo... en la granda halo, kiu cetere havas bonegan akustikon, sonas la senmortaj melodioj de Beethoven, Ĉajkovski, Bach, Mendelssohn. Pasintjare en la sama halo estis organizita la unua en nia lando subtera simfonia koncerto.

Sed kiel malsatigas la freŝa montara aero. Kiam oni anoncis: „al la manĝo“,

ĉiuj kvazaŭ unu persono, saltis el siaj lokoj. Ekflamis grandega fajro kaj ĉirkaŭ ĝi kelkaj bonvolemluloj eĉ sen mikrofono, precipe niaj skotaj amikoj John kaj Ian, ne hezitis amuzigi nin per siaj gitaroj. Estis bela vespero en la montaro.

Merkrede en la granda salono de la kongresejo okazis la unua prelego de ing. V. Peevski „La formo kaj la dimensioj de la tero“, Kvankam iom speciala, ĝi vekis intereson inter la ĉeestantoj, kiuj faris plurajn demandojn al la preleganto.

La oratora konkurso organizita ĵus post la prelego laŭ ĝenerala opinio estis unu el la plej sukcesaj lastatempe. Aperis 10 gekandidatoj el 7 landoj (kvar el Bulgario). Ĉiuj montris bonan lingvokapablon kaj klarajn konceptojn pri la temoj. Lingvaj eraroj estis relative maloftaj. La ĵurkomisiono konsistanta el G. Becker (GFR), C. Minnaja (Italio) kaj R. Tričkov (Bulgario) aljuĝis la unuan premion al Otto Pritz (Norvegio), kiu parolis pri la temo „Ĉu estas por mi Esperanto vere funkcianta rimedo por internaciaj kontaktoj“. Duan kaj trian premion ricevis respektive Francisko Simonnet (Francio) kaj Giuliano Turone (Italio). El la bulgaraj kandidatoj plej bone prezentigis An. Ĉalakov kaj D. Ĉolakova.

Tiun saman tagon en la malfrua posttagmezo la kongresanoj el diversaj landoj estis gastoj al la junuloj en kelkaj entreprenoj — la cementa uzino, la teksa fabriko „J. Ljutibrodski“, la presejo, la urba konsilantaro k. a. Post unu horo la kongresanoj komencis revenadi en la manĝejon kun donacoj kaj bukedoj en la manoj. Mirinda ideo, afablegaj gastigantoj — per similaj vortoj ili esprimadis siajn impresojn. Tio fakte estis nova ero ĝis nun nekonata en la TEJO-kongresoj.

La organizantoj de la belar-



La gejunuloj amuziĝas



I. Tambura el Bamako, Malio, inter gejunuloj



En TEJO-Kongresejo


ta vespero ne sukcesis antaŭe pritaksi la diversflankajn kapablojn de la junaj esperantistoj, tiel la programo de la belarta vespero daŭris ĝis la noktomezo kaj eĉ tiam ne sukcesis kontentigi ĉiujn kandidatojn prezentigi antaŭ la publiko. Aparte menciindaj estas: la programo de la Esperanto-kabaredo „Verda Simio“ el Varsovio, la kantoj de niaj skotaj amikoj kaj kelkaj el la skeĉoj de la studenta dram-grupo el Zagrebo. Tute ĉe la komenco la simfonia orkestro de la distrikta operejo sub la direktado de Stoev prezentis kelkajn verkojn de bulgaraj komponistoj.

Kutime jaŭdo estas la tago de la ekskurso. Nia celo ci-jare estis la insulo „Esperanto“ en Danubo, apud urbo Orjahoŭo. Fine la sopirata sunbanado povis efektiviĝi. Orjanovanoj preparis kortuŝan renkonton ĉe la insulo. Kiam la 13 aŭtobusoj haltis sur la herbejo apud la nova restoracio, la kongresanoj devis malsupreniri en spaliro de infanoj, kiuj donadis al ili florojn kaj insignojn. En la varma somera tago la akvo allogas kaj ĉiuj rapidas ĝui ĝian refreŝigan kareson. Neforgeseblaj restos la horoj sur la blanka sablo de tiu vere esperanta teritorio. Neforgesebla restos ankaŭ la promenado per motorboato, dum kiu ni preskaŭ tuŝis la rumanan bordon. Ĉe la tagmanĝo, dum la

kutimaj salutoj oni anoncis la decidon de la urba konsilantaro meti specialan memortabulon ĉe la restoracio, memore al nia vizito. Antaŭ ol foriri la kongresanoj aranĝis proprainiciate „studviziton“ en la proksimaj vitĝardenoj. Rapide kreiĝas la kontaktoj kun la laborantaj tie kooperativanoj.

La vizitoj en la vilaĝoj Altimir kaj Târnava restos longe en nia memoro. Imagu ke la tuta loĝantaro estis sur la placo kie venis por renkonti la gastojn. En Altimir ludis orkestro, pioniroj kaj vilaĝanoj alportis florojn. En Târnava pluraj surskriboj en Esperanto kaptas nian atenton. La programo antaŭvidas unue viziton en la bovinfarmoj, kie ni eĉ baptis ĵus naskitan bovideton, poste — amasan popolfeston sur la herbejo de la vilaĝa stadiono. La gastamaj kooperativanoj regalis la esperantistojn per akvomelonoj kaj bakita maizo. Multaj kongresanoj flustris en mia orelo: „Imagu ke en nia lando la akvomelonoj estas eĉ pli malofta delikataĵo ol la ĉokolado“. Kiam aŭdiĝis la ordono „Al la aŭtobusoj!“ sincere bedaŭris gastoj samkiel gastigantoj. Belegan bildon prezentis la kolumno de 13 aŭtobusoj kun iliaj blankaj kaj ruĝaj lumoj en la agrable varma aero de la somera nokto.

Vendredo — praktike la lasta labor



En la teksa fabriko

tago de la kongreso. Ĝi estis grandparte dediĉita al problemoj de Afriko. Antaŭtagmeze okazis la tria diskutgrupo „Kien iras Afriko?“, gvidata de Jerzy Piettucha kaj posttagmeze la prelego de Lic. Tibor Sekelj pri liaj „Impresoj el Afriko“, kolektitaj dum preskaŭ unujara vagado tra la orienta parto de la nigra kontinento, ĉefrunte de la t. n. karavano de amikeco.

En la kongresejo estis aranĝita ankaŭ „Angulo de ekstereŭropaj kulturoj“, kiu en bildoj kaj libroj provis modeste speguli la kulturajn valorojn kaj nuntempan staton de la landoj precipe en Afriko kaj Azio. Ĉio ĉi montras la emon kaj la interesiĝon de la esperantista junularo serioze diskuti pri la plej gravaj problemoj de la nuntempa mondo.

La diskutaj grupoj jam estiĝis tradicia kaj utila ero en la programo de la TEJO-kongresoj. En Vraca oni diskutis krome pri la temoj: „Ĉu kontraŭmilitaj kampanjoj vere efikas?“ kaj „Grandaj kaj malgrandaj popoloj“. Dum la diskutado pri la unua temo, kiun gvidis Jean Thomas (Francio), aktive partoprenis deko da junuloj. Ili plejparte rekonis la efikon de la kontraŭmilita aktiveco kaj precipe la fakton ke la popoloj povas kaj devas forte influi al la politiko de la ŝtatoj. Iuj junuloj esprimis pesimismajn dubojn pri la efiko de iuj kontraŭmilitaj kampanjoj. Tamen la lastaj vortoj de la gvidanto: „Pli bone hodiaŭ aktivaj ol morgaŭ radioaktivaj!“ renkontis la aprobon de la plimulto el la ĉeestantoj. En la alia diskuta grupo, kiun gvidis S. Simeonov (Bulgario), superis la opinio, ke grandaj kaj malgrandaj popoloj povas kaj devas kunvivi pace, surbaze de la principoj de la Ĉarto de la UN.

En la Komitato de TEJO oni pridiskutis unue la raporton de la Ĝenerala sekretario kaj la ĉefajn antaŭstarantajn taskojn: la agadon en la lernejoj, pri kiu la estrarano Sl. Zlatnar prezentis raporton antaŭ la Konferenco en Beograd, la agadon en malproksimaj lan-

doj, la distribuadon de la nova gazeto „Kontakto“ k. a. La Komitato diskutis pri la eblecoj okazigi la 21-an kongreson de TEJO en Japanio kaj reelektis la Estraron en ĝia ĝisnuna konsisto, nome: G. Becker (GFR), C. Minnaja (Italio), S. Simeonov (Bulgario), M. Pietrzak (Pollando), I. Osibov kaj Sl. Zlatnar (Jugoslavio). La Estraro krome havis utilajn kontaktojn kun la observanto de la MFDJ Robert Pinel, kun kiu oni diskutis la eblecojn pri eventuala estonta kunlaboro kaj utiligo de la internacia lingvo en la laboro de la MFDJ. Oni interkonsentis principe klopodi pri aranĝo de seminario, kun la helpo de la MFDJ, pri la lingvaj problemoj en la agado de la internaciaj junularaj organizaĵoj.

Dum la ĝenerala kunveno de TEJO, kiu okazis vendrede en la granda salono de la kongresejo oni diskonigis la diversajn decidojn de la Komitato kaj oni disdonis la premiojn al la gajintoj en la oratora konkurso kaj en la sportaj konkursoj. Tuj post tiu oficiala aranĝo de TEJO, du aŭtobusoj veturigis la dezirantojn partopreni alian solenaĵon. Nome, en regiono aparte pitoreska kaj tre ofte vizitata, survoje al „Ledenika“, la Urbestaro decidis starigi okaze de la



La gejunuloj promesas labori aktive

kongreso imponan memortabulon. Ĉe ĝia inaŭguro parolis la Urbestro — Ljudmil Jančev kaj danke respondis S-ro Günther Becker — Prezidanto de TEJO. Ambaŭflanke de la tabulo ili plantis simbole du kverkojn. „Eterna estu la amikeco inter la junuloj eĉ la tuta mondo!“ estis la lastaj vortoj de la Urbestro.

En tiu lasta tago la Urbeŝtaro ankoraŭfoje montris sian eksterordinare grandan simpatian al nia kongreso aranĝante specialan operprezentadon por la kongresanoj. Estis prezentita kun granda sukceso la opero „Bohemianoj“ de Puĉini. Tiu lasta vespero estis aparte vigla, ĉar post la operprezentado en la manĝejo okazis la lasta gaja vespero, kies celo interalie estis ankaŭ la elekto de Miss Esperanto 1963. Kompetenta komisiono gvidata de Diccon Masterman pritaksante la rezultojn de la ĝenerala voĉdonado kaj juĝante ankaŭ la lingvoscion de la kandidatinoj anoncis la jenan rezulton de la konkurso: oni nomis Miss Esperanto 1963 f-inon Maria Wenczel el Hungario. Je dua kaj tria loko, same ricevinte donacojn kaj... kisojn oni klasifikis f-inon Diethilde Magori el GFR kaj f-inon Helen Salmose el Svedio. Post tiu ceremonio nur restis la dancoj ĝis la dua matene.

Alvenis la adiaŭa momento — la soleca fermo. En la granda salono de la kongresejo denove estas kolektitaj ĉiuj gekongresanoj. La Vicprezidanto de TEJO — Carlo Minnaja kelkvorte skizas la karakteron de la kongreso kiel unu el la plej sukcesaj kongresoj de TEJO ĝis nun, kongreso sendube plej amasa kaj kun plej larĝa publika reeno. Tute speciale gravas la fakto, ke por unua fojo la kongreson de TEJO ĉeestis observanto de granda internacia junulara organizaĵo, fakto, kiu per si mem parolas pri la kreskanta aŭtoritato de TEJO. S-ro Minnaja dankis je la nomo de la Estraro de TEJO al la Kongre-

sa komitato pro ĝiaj unuaj klopodoj ĉe la antaŭpreparo de la kongreso. La prezidanto de la KK S. Simeonov siavice dankis al la membroj de la KK kaj tute speciale al la Urbestro kaj al la aliaj urbaj kaj departementaj instancoj, pro ilia plena simpatio al nia afero kaj diversflanka helpo kaj apogo dum la antaŭpreparoj same kiel dum la kongreso mem. Post tio li disdonis amason de donacoj al la perantoj, al la partoprenantoj en la kulturaj programoj kaj al ĉiuj aliaj kiuj iamaniere kontribuis al la sukcesa evoluo de la kongreso.

Je la nomo de la nederlanda sekcio de TEJO inviton por la 20-a kongreso de TEJO faris S-ro Wouter Pilger, post kiu la Vicprezidanto de TEJO Carlo Minnaja deklaris la kongreson fermita.

Por la junaj esperantistoj la kongresa semajno estas aparte aktiva periodo. Dum ĝi oni malmulte dormas kaj multe laboras, dancas kantas. Sabate tagmeze kvar specialaj vagonoj atendis la kongresanojn ĉe la stacidomo. Karavane ili veturas al la 48-a UK en Sofio. Malmultaj ni restis sur la kajo, sed viaj radiantaj vizaĝoj, karaj amikoj, sur la fenestroj de la vagonoj, esprimantaj kontenton pri tiu bela semajno en Vraca estis por ni la plej valora rekompenco por la streĉa laboro dum pluraj monatoj. „Ĝis revido, karaj geamikoj!“! Ek de nun tiajn salutojn oni aŭskultos en Vraca ankoraŭ pli ofte.

POR NOVA KOVRILLO DE BE

Multaj esperantistoj esprimis opiniojn pri la kovrilo de „Bulgara Esperantisto“. La redakcio intencas dum la nova jaro ŝanĝi la eksteran aspekton de nia gazeto.

Ni petas niajn legantojn proponi al ni ideojn projektojn pri kovrilo. La nomoj de la aŭtoroj de la plej bonaj projektoj estos publikigitaj. La akceptita projekto estos honorariita. Limdato — 30. XI. 1963.

40-a datreveno de la Septembra Ribelo en 1923

Sub la forta influo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj partopreninte kontraŭvole en la imperialisma milito en daŭro de 4 jaroj, en 1918 unuaj post la rusaj laboristoj kaj kamparanoj direktis la armilojn kontraŭ la monarkio, por la respubliko. Sed ilia provo por ribelo estis frakasita. La 23-an de Septembro 1923, reaginte kontraŭ la monstraj krimoj de la agresiva faŝismo la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj sub la gvido de la komunista partio, proklamis la unuan en la mondo kontraŭfaŝisman ribelon. Gvidantoj de la Ribelo estis Georgi Dimitrov, Vasil Kolarov, Gavril Genov k. a. La ribelintoj montris mirindan herocon. Epopea estis la fama popo Andreo, kiu fariĝis viktimo de la bestiginta burĝaro. La Gloran Septembran Ribelon priantis post unu jaro Geo Milev, kiu verkis sian vervan poemon „Septembro“, parton de kiu ni publikigas aparte. Por tiu ĉi „eksterordinare civitana kuraĝeco“ — prianti la heroismon de la laboristoj kaj kamparanoj de Septembro 1923, pro tio ke malkaŝe li estis kun la popolo kontraŭ la reakcio Geo Milev estis mortigita sen kiaj postsignoj en 1925.

La popolo estis heroo, sed la ribelo ne sukcesis, ĝi estis frakasita, estis verŝita abunde la popola sango, estis enskribitaj glorplenaj paĝoj en la nova bulgara historio.

La ribelo ne sukcesis, ĝi tamen fosis profundan, ne transireblan abismon inter la popolo kaj ĝiaj premantoj. Ĝi inspiris al la popolo pli firmajn fidojn je siaj propraj fortoj. Kun kredo en siaj fortoj la laboristoj kaj kamparanoj daŭrigis la batalon dum la sekvinta peza periodo de la monarĥia faŝisma diktaturo.

La 9-an de Septembro 1944 la laboristoj kaj kamparanoj, sub la gvido de la komunista partio, ribelis denove, renversis la regadon de la burĝaro kaj starigis popolan regadon.

La Naŭa de Septembro malkovris la vojon por la konstruo de la nova socialisma ordo en Bulgario.

Georgi Dimitrov alte pritaksis la grandan signifon de tiu ĉi klasa batalo en Septembro 1923, ke sen la influo kaj la instruoj de la Glora Septembra Ribelo 1923 ne estus ebla la kreo de la potenco Patrolanda Fronto kaj la historia venko de la Naŭa de Septembro 1944!

Eternan gloron al la pereintoj en la Ribelo en Septembro 1923.

Triumfu eterne la venko de la 9-a de Septembro 1944!

Geo Milev

EL LA POEMO „SEPTEMBRO“

Septembro! Septembro!
Ho sanga monat'!

De supreniro
kaj disromp'!
Unua ribelis Măglij —
Nova
kaj
Ŝtara Zagora
Ĉirpan
Lom
Ferdinand
Berkovica
Sarambej
Medkovec
(kun pop Andrej)
— vilaĝoj kaj urboj.

— — —
Popolo ribelis —
kun martelo
en mano.
Kovrita de fulgo, fajreroj, skorio,
— kun rikoltilo surkampe,
trasorbita de frosto kaj pluvo:
homoj de l' nigra laboro
kun senesprima pacienco.

— — —
Miloj da kredoj
— kred' je popola leviĝ',
miloj da voloĵ
— volo de vivofeliĉ,
miloj da koroj sovaĝaj,
— kaj en ĉiu kor' flamo,
miloj da nigraj manoj
en rondo ruĝa de l' vast',
levantaj impete supren
purpurajn
standardojn
flirtantajn

alte
senhalte
super la tuta en trem' kaj tumulto skuata patri'
frukto de ŝtorma rabi':
miloj —
amaso —
popol'.

— — —
Ĉiuj skribaĵoj de filozofoj, poetoj —
realiĝos!
— Sen Dio! Sen mastroj!
Septembro estiĝos Maj'!
La homa viv'
estos senhalta suprenir'!
— Nur supren! Nur supren!
Edeno ekestos sur ter'!
Ekestos!

Tradukis: Ĥristo Gorcov kaj

David Sasonov



Hristo SMIRNENSKI

(Okaze la 65-jaran datrevenon de la naskiĝo de la granda
proleta kaj popola poeto)

Hristo Smirnenski naskiĝis la 30-an de septembro 1898 en urbo Kukuŝ, Egea Makedonio; i mortis pro tuberkulozo la 18-an de junio 1923 en Sofio neatinginte 25-jaran aĝon.

En tiu mallonga periodo Hristo Smirnenski postlasis grandan literaturan heredaĵon — poemojn, bonhumorajn kaj satirajn rakontojn, notojn kaj ŝercojn. Jam dum sia vivo Smirnenski estis amato de la bulgara laboristaro kaj de ĉiuj progresemaj homoj en Bulgario. Aparte kara kaj amata Smirnenski estis al la bulgara progresema junularo. Mem filo de laborista familio, Smirnenski respegulis en siaj versaĵoj la revolucion impeton de la laborula bulgara popolo, gvidata de la Bulgara Komunista Partio.

Dum la periodo de la monarkofaŝista diktaturo en Bulgario la verkoj de Smirnenski estis malpermesitaj. Sed liaj fajroplenaj poemoj estis permane reskribataj kaj estis deklamataj dum laboristaj solenaĵoj, dum ekskursoj kaj protestdemonstracioj. Dum la jaroj de la rezistado Smirnenski estis unu el la inspirantoj de la bulgaraj partizanoj. En tagoj de pezaj suferoj, en horoj de malegala lukto kun la polic-faŝistaj bandoj, la partizanoj batalis deklamante kaj kantante liajn kantojn kaj poemojn.

La tempo elprovis la profundan socian enhavon kaj la flamantan patoson de la verkaro de Smirnenski. Ankaŭ nun, dum la periodo de la socialisma konstruado en Bulgario, la kantoj kaj la poemoj, la felietonoj kaj rakontoj de Smirnenski estas la amataj legaĵoj kaj deklamaĵoj de la bulgara laborula popolo en urboj kaj vilaĝoj. Liaj verkoj estas presataj kaj disvastigataj en centmiloj da ekzempleroj. Jam ne estas civitano en Bulgario, kiu ne konas la fruemortintan poeton. Kaj ĝuste pro tio hodiaŭ Hristo Smirnenski en la sama grado kiel Hristo Botev kaj Ivan Vazov, estas ŝatata kaj amata kiel vera, kara kaj inspirita popola poeto.

Georgi Karaslavov



Hristo Smirnenski

LA RIBELO DE VEZUVO

Kun granda pacienco kaj esper'
dum la jarcentoj longaj de obskur'
fiksinte revrigardon al lazur'
Vezuvo staras firme kaj koler'
el ĝia brust' giganta ŝprucas nur.

Kaj dum maten' sur ĝia ŝton' sin'
sur la rokar' enpensiginta nun,
ekpendas la nebuloj de l' aŭtun',
eravagantaj ai la malproksim',
al kiuj ĝi konfidas en mallum'.

Pompeo kiam dum la nokt' en bril'
festenas en volupto kaj frenez',
Vezuvo kapon levas kaj sen ĉes'
el ĝia brust' kolero verŝas sin,
sed post moment' ekmutas ĝi en fin'.

Forŝiras sin el ĝia ŝtona brust'
ĝemspir' obtuza en inkuba nokf'
kaj ĝia eho kun terura fort'
aperas en la haloj de l' plezur'
por ĝeni la orgiojn per konfuz'

En frenezaj fiorgioj
dronas la festanta urb'
kaj tra l' haloj en ebrio
ŝprucas vino kaj adult'.

La marmoraj kolonaroj
ĉies pekon en sekret'
scias — kaj sur ilin daŭre
gojoj plektas sin en ret'.

Dum vesper' sur la arenoj
glavo de gladiator'
al la fratoj kun malbeno
flustras vortojn de horor'.

Kaj l' amasoj en ekstazo
estas, kiam la leon'
kun avid' sen embaraso
lekas sangon de la hom'.

Sed sur la tunikoj blankaj
nigra signo staras jam —
super la amasoj strangaj
kaŝembuskas la gigant'.

Kaj foje hirtiĝis la monstra giganto
kaj fulmo ekbrilis sur ĝia kontur';
malvarma flueto konfuze blovante
skuigis la halojn en granda terur'.

Kaj tondre Vezuvo skuigis kun forto
la korpon potencon de l'urbo el ŝton',
kaj trem' nekonata sin tiam ekportis
gasi' kvazaŭ pelata de domo al dom'.

Tie super pinto ŝtona ŝprucas fajra laf' fantoma
kaj sin verŝas kaj tordiĝas kiel orosanga flag' —
la giganto sin envolvas en malhela fum' kaj polvo
stratoj, placoj, konstruaĵoj dronas en mallum' kaj krak'.

Fulm' ekbrilas tie fore en la flamoj multkoloraj
kaj en blovo sin ekmovas cindro, tondro, fum', vapor',
kaj amasoj vizaĝpalaj kuras al la urbportaloj
fugas, amasiĝas are sen konsolo kaj kun plor'.

Falas kolonaroj brue kaj brulantaj ŝtonkonstruoj
ĝemas, siblas kaj disverŝas milfajrerojn pli kaj pli;
ĉie la mallum' densiĝas, ŝtona pluvo ekverŝiĝas
kaj vulkano kun rikano tondras en flumanta bril'.

Kaj por festo mortmirinda en senhoma urbo hirte
raba Mort' alpaŝas meze de la pompa festenhal',
jen la lafo fajrospira tondras, fulmas kaj aliras
kaj per ĝi pereon verŝas en kolero la gigant'.

„Vezuvo! Vezuvo!“ — En hor' eklamentis
konfuzaj virinoj kaj viroj pro tim',
„Vezuvo, Vezuvo!“ Kaj morta timento
la korojn senzorgajn frostigis sen lim'.

Hirtinte en malico kaj kolero,
Vezuvo brilas en purpur',
ŝirinte sian fajran flamuteron
kaj tremas en kolero nur.

„Sur miaj ŝultroj pezis dum jarcentoj
profana rid' kaj prema malhonor',
vi filoj de la valoj polvoplenaj,
droninte en diboĉo tra l' ĝardenoj
festadis vi en pek' kaj bonodor'.

Dum la festenoj vantaj kaj orgioj
ne ĉesis de la glasoj la sonor';
knabinoj, idolpastroj, patricioj
mokadis per la far' ofenda sia
pri mia ŝajna, daŭra dorm'.

Kaj sciis vi, ke ĉiuj vi sin nutras
per mia humilplena sin':
la greno kaj la rozoj en aleoj lumaj,
la vino kiu dum festeno fluas
kaj via karno — font' de krim'.

Stultuloj! Multa fort' en mia brusto estis
kaj tamen estis via sklavoj mi;
naskitaj en la ebenajoj plataj
por vi la suproj restis nekonataj
kaj la terur' de mia forta kri'.

Sed kun koler' en cindron kaj en fajron
mi aliĝos la fetiĉojn jam;
de viaj mortaj haloj mi rigardon
forturnos, kaj amasojn mi kun ardo
obsedos per venkanta mia flam'!“

Ŝprucas en stratoj dezertaj purpure
 ondoj fajrantaj el flam';
 ardas la lafo kaj ŝtorme ekfluas,
 fumas en nigra ornam'.

Kaj incendio tra fumo aperas.
 brilas rubena flamstri';
 surde aŭdiĝas jen ĝem' senespera
 kaj silentiĝas tuj ĝi.

Preter la bordo amasoj multmilaj
 sin puŝas en kri' kaj sufer',
 ondas kaj ŝaŭmas la mar' antaŭ ili
 en sia granda koler',

1920

post ili hirtre Vezuvo starigas
 sian potencon el fajr',
 helaj torentoj de lafo ŝprucinta
 lumas kun sorĉa flamar'.

Kun povo terura, tra l' vasta obskuro
 Vezuvo ektondras en glori'
 kaj forte per murdo ekkaptas la urbon
 sendadas ruĝondojn ĝi for.

Kaj jen la konstruoj ekfalas kun bruo
 kaj ilin surverŝas torent',
 en kavo malhela de nokto senstela
 perdiĝas la lasta lament'.

Tradukis: At. Lakov

Ĥristo Smirnenski

MOSKVO

Ho Moskvo, Moskvo!
 Vi ree pulsas, ree ardas pura!
 Vi ree estas kor' en flamoj,
 vi gardostaras kun ridet' purpura
 ĉe frate kunpremitaj manoj.
 Dispelas vi per brilo de aŭro
 l' obskuron de la globo tera,
 kaj kolektiĝis jam en via koro
 la ĝojo kaj la trist' kolera
 de l' tuta turmentata tero! . . .
 Ho Moskvo, Moskvo! —
 Vi koro el fandita tero!

Ho Moskvo, Moskvo!
 Rompiĝis kontraŭ via citadelo
 la ondo de la invadanto;
 kiel ruben' radias via stelo
 al ĉiu suferanta lando,
 en kiu sklavo plugas kun amaro,

1921

kaj mortas sen pecet' da pano
 kaj kie tondre la proleta maro
 ekbolis pro la uragano
 de la kvinjara militplago.
 Ho Moskvo, Moskvo! —
 Vi stelo de la nova tago!

Ho Moskvo, Moskvo!
 El viaj placoj vi hodiaŭ diras
 verdikton super ĵug' centjara.
 Vin Rom', London', Berlin', Pariz' admiras,
 ĉar estas vi mondcentro proletara.
 Fieras vi en via bru' kaj brulo
 kaj, sopirante pri la lasta lukto,
 per ĉiu maljunulo kaj junulo,
 bataltrumpetas vi tra l' mondo tuta,
 kaj via voko rompas la katenojn! . . .
 Ho Moskvo, Moskvo! —
 Vulkan' el koroj ardoplenaj!

Tradukis: Asen Grigorov

Ĥristo Radevski

ĈE LA TOMBO DE ĤRISTO SMIRNENSKI

Staras ni
 enpensiginte tie
 ĉe l' eterna via tera hejm'.
 Vento nin salutas emocie
 kaj ĝi plue
 flugas for kun ploroĝem'!
 Scias ĝi,
 ke kuŝas en la tero
 nia instruisto kaj poet'.

Super vin vizaĝon palan la vespero
 kiel panjo
 klinis en silent'.
 Ne kunvenis ni ĉe l' tombo sankta
 por ploradi
 larme en lament'...
 Sed ni ĵuras
 nun je viaj kantoj
 kaj je via hela testament'.

Vi instruis nin,
Smirnenski,
kanti . . .
Bajonetojn forĝi el la vers',
nin instruis bajonetojn fari —
el la larmoj kaj el rid' sen ĉes'!
Sed kun vi okazis io stranga!
Dum la viv'
vi bolis en sopir',
vi alvokis al batalo sanga —
kaj en lit'
ja ĉesis via spir'!

Vere, strange nun la vivo flugas:
ofte ĝi nin mokas per kapric' . . .
Sed ni baldaŭ ĝin fortike jungos,
baldaŭ iĝos nia ĝi novic'.
Ne funebru,
kamarado kaj poeto!
Ne enplektis nin en siaj retoj
„de la vivo griza la nalklar'“ . . .
kion revis vi sen bar'
kuplete,
ni ĝin enkorpigis ja
en far'!

1931

Tradukis: At. Lakov

AGRABLE KAJ UTILE

*Memore al la E.-pioniroj Hristo
Haralambev el Târnovo kaj Mladen
Georgiev, mia amata patro*

— Kion signifas „parodio“? Kio estas la parodio? — subite demandis H. H. kaj ĵetis ruzan rigardon al mia flanko. Mi mallevis okulojn sinĝene, timante ke li postulos nome mian respondon al sia demando de „ekzameno E.-propagandcelo“.

— Ĝi estas io simila je sopiro kun misdirekto — per sia milda voĉo kaj kun sia ĉiam ĉarma rideto respondis tuj mia patro, rimarkinte mian sinĝenemon kaj lian ruzecon.

Ektondris ridego. Unue ekridis la esperantistoj, poste ankaŭ la cetera parto de nia ekskursita kompanio, post kiam I. N. ja tradukis el Esperanto bulgaren la ŝercan diron de mia patro.

Mi konfuziĝis kaj H. H., la ruzulo, rimarkis tion. La tutan tempon li celis paroligi min en Esperanto kaj neniam lasis min trankvila.

— Havas la parolon la plej juna kaj la plej nova membro de la Esperantista grupo „Lumo“ en Târnovo, Bulgarujo! — aplombe ĉesigis li la ridon. — Diru Z. M. kion signifas kaj kio estas „parodio“! En Esperanto!

La ordono estis definitiva kaj plenumbla.

Mi streĉis cerbon por „vivigi mian Esperanton“ kaj tre kuraĝe, eĉ iom emfaze eldiris mian unuan en la vivo „publikan E.-frazon“:

— Tio estas io serioza en formo ne serioza.

La nean partikulon mi akcentis multsignife kaj iomete malafable. La simpatia, milda kaj ĉiam ĝentila G. A. decidis kuraĝigi kaj bonhumorigi min. Li tuj diris kun sia ĉiam sindetena kaj sinĝena rideto, per voĉo mallalta kaj gaje serioza:

— Jes, vere! Bone vi ĝin diris: „io serioza en formo ne serioza“. Alivorte, laŭ mi: Unueco el la agrabla kaj la utila.

„Agrabla kaj utila! Tia estas ankaŭ Esperanto. Kaj jen, H. H. kaj paĉjo ĉiam agrable kaj utile ĝin propagandas ja“ — ekpensis mi.

Ho, rememoro plaĉa el la fora estinteco! Kiel firme mi memoras la fruajn, la unuajn impresojn kaj streĉajn travivaĵojn!...

Ĥ. Ĥ., dank' al kiu do mi ekparolis Esperanton unuafoje „publike“, diris laŭte, per voĉo „instruista“:

— Parodio estas ridiga burleska travestio de serioza verko, aliigo de serioza verko en burleskan, gaja kaj gajiga imito.

— Gu ne ekzemple „samkiel vi estas parodio de simio“? — demandis ŝajne „naive“ lia frato, kiu same partoprenis en tiu esperantista ekskurso al virina monaĥejo de Prisovo apud Târnovo, dimanĉe, la 25-an (12) de aŭgusto 1912. Li serce serioze ripetis sian demandon bulgarlingve, ĉirkaŭprenante karese sian fraton, kaj tuj rapide fuĝis for de li. Ĥ. Ĥ. tamen ne ofendiĝis — male, li ĵetis ridetante:

— Jes, preskaŭ tiel, ĝuste, kara mia fraĉjo!

Denove ektondris ridego komuna.

Tamen post*ĝi — ho, post ĝi... ekfulmis io terura por mi — Ĥ. Ĥ. atake komencis „inici min en la E.-parolon“. Interalie li igis min ripetii po dufoje lian diron „pri la parodio“ kaj la diron de lia frato „pri la ekzemplo de parodio“... Savis min finfine denove mia patro — li ekrecitis bulgarlingvajn parodiojn kaj per tio ĉesigis mian „ekzamenan ŝvitigon“.

Kvindek jaroj pasis jam de tiam kaj depost la morta dato de Ĥ. Ĥ., tamen viva kaj tute freŝa estas mia memoro pri li — la E.-pioniro el Târnovo, la dua „viva esperantisto“, kiun mi vidis en mia vivo (la unua estis ja mia patro mem).

Okaze de la 50-a datreveno de lia pereco en la Balkana Milito, mi dankeme kaj kiel fidela disĉiplo rememoras nun kun sopiro pri li, pri Ĥ. Ĥ. nome, kaj pri mia patro (mortinta antaŭ 12 jaroj).

Anstataŭ florojn meti sur iliajn tombojn, mi recitos jene la parodiojn en Esperanto, kiujn mi aŭdis de ili ambaŭ tiam, en aŭgusto 1912, kaj neforgeseble ja memoras ilin ĝis nun kaj por ĉiam.

LA VOJO

Tra densa vualo ruĝetas la buŝo
al kiu kuraĝe ni iras.

Simile al stelo en nokta ĉielo

al ni la direkton ĝi diras.

Kaj nin ne timigas patrinaj admonoj,
nek batoj per vorto, nek patraj bastonoj,
ĉar klara kaj freŝa kaj tre difinita
ĝi estas — la buŝ' elektita!

Ni kisas kaj kisas, neniam laciĝas

pri l' kisoj estontaj pensante.

Cent kisoj aŭdiĝas, mil kisoj aŭdiĝas —
ni kisas kaj kisas konstante.

„Ho, ĉesu jam kisu!“ — la avoj admonas.

„Ne ĉesu, ne ĉesu!“ — en kor' al ni
sonas —

„Obstine kisadu! Fraŭlinoj vin benos,
se vi paciencie eltenos“. (Ĥ. Ĥ.)

" " " " " " " "

LA ESPERO

En la koron venis nova sento,
tra la koro iras amdoloro.

Per flugiloj de facila vento

nun de koro flugu ĝi al koro.

Ne la gorgo vinon soifanta

ĝi la novan tiras familion:

al la par' fidele sin amanta

ĝi promesas sanktan harmonion.

Sur la sankta signo de l' espero

kolektiĝas ambaŭ geamantoj

kaj rapide kreskas la afero

per laboro de la esperantoj.

Nia kora kara kolegaro

en laboro ama ne laciĝos,

ĝis la bela sonĝo de l' edzaro

pri amata fil' efektiviĝos. (M. G.)

PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO

Amantojn Vi kreis perfekte kaj bele,
sed ili disiĝis batale;
animo animon atakas kruele,
kor' koron atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, amo mistera,

aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
redonu la pacon al la animaro
de l' amantaro!
Ke restu por ĉiam la amo en vero
kaj belo sur tero. (Ĥ. Ĥ.)

Zora Mladenova Ĥans

Atanas D. Atanasov — Ada

Dudeka leciono

KUN LA GASTOJ

Nature la gastoj devas trarigardi nian urbon por koni ĝin. Mi, mia fratino kaj Marko kondukas ilin en muzeojn, en parkojn, montras al ili monumentojn, eniras la zoologian ĝardenon, la katedralan preĝejon. Mi ne atendas, ke tiuj vidindaĵoj impresos ilin, kiuj vizitis jam multe pli grandajn urbojn. Tamen ili restis ravitaj de la granda apudurba parko kaj ankaŭ de la granda katedralo. Ĝenerale al ili plaĉas nia ĉefurbo.

Ni lasis la du inojn iri en magazenojn por fari aĉetojn. Petersen, akompanate de mi kaj Marko, vizitis la danan ambasadorejon. Poste li esprimis deziron raziĝi sin. Ni kondukis lin en razejon, kie laboras samideano-barbiro. Petersen estis surprizita, aŭdinte la raziston paroli en Esperanto. Sed la razisto mem estis duoble pli ravita razi alilandan samideanon. Kiel sciante, la razisto estas la plej parolema popolo; tio estas ilia klasika trajto. Sed nia samideano Figaro havis plian motivon por sia parolemo: unuan fojon li parolis Esperanton kun fremdulo, li provis siajn sciojn kaj li estis feliĉa kompreni kaj komprenigi sin en la internacia lingvo. Li do ne ĉesis paroli kaj demandi, dum li sapumis la barbon de Petersen.

Marko sidas silente kaj foliumas ian ilustritan gazeton. Mi ripozas en dolĉa nenifaro. Subite al miaj oreloj venas konata voĉo: en la apuda fako, kiu estas frizejo, parolas mia fratino. Kaj kio mirigis min — ŝi parolas sufiĉe senĝene en Esperanto! Mi komprenis: certe s-ino Petersen deziris frizigi sin kaj mia fratino kondukis ŝin al la frizejo, kiu estas fako de la razejo, ne supozante, ke ŝi troviĝas en la apuda fako. Domaĝe la frizistino ne parolas esperante kaj mia fratino devas traduki.

Jen Petersen estas jam razita, la barbiro diras la kutiman gratulon por la okazo. Dum Petersen remetas sian kolumon kaj butonumas sian veston, mi sciigas al li, ke lia „delikata duono“ estas en la najbara fako. Ni do atendas la inojn kaj mi rakontas pri la miraklo: la senĝena parolado de mia fratino en Esperanto.

Jen sur la sojlo aperas s-ino Petersen bele frizita, freŝa, gaja, pepanta, kaj kun ŝi ankaŭ mia fratino kun radiantaj vizaĝoj, en plej bela humoro. Ni eksciis, ke komence, kiam la du inoj restis solaj, mia fratino balbutis kun peno esperantajn frazetojn, poste iom post iom ŝia longo liberigis, fine ŝia parolado ekfluus pli rapide kaj senĝene kaj ŝi eksentis grandan plezuron je la konversacio; en iu momento, ne trovante traŝan esperantan vorton, ŝi esprimis sian penson perifraze, kaj s-ino Petersen helpis ŝin.

Marko rimarkigis: „Ĉi tie efikas grava faktoro: la situacio de neceseco. Se ni estus estintaj ĉiuj kune, certe la fraŭlino ne estus perdinta la ĝenon paroli... Ni devus meti en tian situacion ankaŭ Georgon...“

Jes, ĉar vere Georgo ankoraŭ ne kuraga ekparoli libere en Esperanto kaj preferas aŭskulti nian konversacion, feliĉa, ke li ja komprenas ĉion.

PROVERBOJ

Nobelo promesojn disdonas, kampulo promesojn plenumas. Ĉia dono estas bono.



UM ne havas strikte difinitan signifon. Oni uzas ĝin malofte por formi el radiko vorton kun nova signifo, se neniu alia sufikso estas konvena. (En tiu rilato ĝi similas la prepozicion **je**). Ordinare la kunteksto (la ceteraj vortoj en la sama frazo) ĉiam ebligas klaran komprenon de la tiel formitaj vortoj, kiuj cetere estas en tre limigita kvanto.

butono — Mi butonumas mian jakon.

aero — Li malfermis la fenestron por aerumi la ĉambron.

gusto — Gustumu tiun ĉi vinon (provu ĝian guston)!

kolo — La kolumo de mia ĉemizo (la parto, kiu ĉirkaŭas la kolon).

palpebro — Palpebrumi — rapide fermi kaj remalfermi la okulon (ofte por doni sekrete signon).

nazo — Nazumo — speco de okulvitroj, tenataj je la nazo (ne per orelapogiloj); nazpinĉilo.

PRI LA VORTFORMADO

La vortradikoj en Esperanto havas per sia signifo karakteron gramatikan — de substantivoj, adjektivoj aŭ verboj.

La radikoj **tabl**, **pord**, **seĝ**, **ĉeval** klare montras objektojn aŭ estaĵojn, do ili estas **substantivaj** radikoj.

La radikoj **bel**, **alt**, **jun** kc. kaŝas en si signifon de kvalito (eco); ili estas **adjektivaj** radikoj.

La radikoj **skrib**, **lev**, **vid**, **ir**, **manĝ**, **pren** kc. esprimas agojn, farojn, la radikoj **ripoz**, **kuŝ**, **star** kc. esprimas statojn; tiuj radikoj havas **verban** karakteron.

Por formi el substantiva radiko alian vorton kun signifo de ago, ni devas verbigi ĝin. Tio estas farebla per aldono de la verba finaĵo (i, as, is ktp.) al la radiko: martel-i, brosi, aŭ per respektivaj sufiksoj (ig, iĝ, um): edzigi, profesoriĝi, butonumi.

Por formi verbojn el adjektivaj radikoj ni aldonas verban finaĵon al la radiko — se ni deziras esprimi eston, staton: *mi juna*s (mi estas juna), *la agroj verda*s, *la neĝo blanka*s, aŭ respektivan sufikson (ig, iĝ), se ni deziras esprimi agon, ricevon de nova kvalito aŭ transiron en novan staton: *purigi*, *purigi*, *sanigi*, *malsanigi*, *blankigi*, *blankigi* kc.

Se ni deziras formi substantivon el verba radiko, ni aldonas al ĝi la substantivan finaĵon **o** (respektive la sufikson **ad**) — por fari nomon de ago aŭ de stato: *lego*, *legado* *skribo*, *skribado*, *sidado*, *kuŝado* kc., aŭ konvenajn sufiksojn — por fari nomojn de persono, kiu agas (ist, ant, int kc.: *kantisto*, *leganto*), nomojn de instrumentoj por tia ago (il: *fosilo*, *kudrilo*), nomojn de la produktata objekto aŭ de la objekto de la ago ĝenerale (aĵ: *skribaĵo*, *legaĵo*, *vidaĵo*).

La plejmulto el la radikoj havas klaran gramatikan karakteron, tuj kompreneblan. Estas tamen kelka kvanto de radikoj, kies karakteron oni devas lerni; en la vortaroj ili estas donataj respektive en substantiva, adjektiva aŭ verba formo laŭ sia interna gramatika esenco. Tiaj estas ekzemple:

pioĉ — nomo de instrumento — substantiva radiko. Pioĉi — agi, labori per pioĉo.

Nomo de la ago: pioĉado.

fos — verba radiko. Nomo de la ago: foso, fosado; nomo de la aganto: fosisto, fosanto; nomo de la instrumento por tiu ago: fosilo.

Substantiva radiko **bros**: broso, brosa (havanta econ de broso: brosa aspekto de hararo, aŭ apartenanta al broso: brosa tenilo), brosi (brospurigi, brosumi), brosado, brose (li purigas sian veston brose, per broso aŭ per brosadon).

Adjektiva radiko **blank**: blanka, blanko, blankeco, blanki (aspekti blanka, fari impreson per sia blanka koloro), blankigi, blanke (ĝi aspektas blanke).

Verba radiko **kudr**: kudri, kudro, kudrado, kudristino, kudranto, kudrilo, kudra (kudra okupo, kudra metio), kudre (mi riparas la ŝiraĵon de la vesto kudre, per kudro).

Bon: bona — kiu havas la econ bon, bonecon.

boneco — la kvalito bon — eco de la bonaj aĵoj.

bono — ĉio ĝenerale, kio estas bona (bona ago, bona stato, bona sento ktp.). Por la bono de la homaro.

NOTO.— La teorion pri la gramatika karaktero de la esperantaj vortradikoj starigis ĉirkaŭ 1911—12 René de Saussure (legu: Rêne dē Sosŭr — sviso; ĝin prilaboris detale Kalocsay (legu Koloĉaj) — hungaro. Plue

J. A. Gill asertas, ke la esperantaj radikoj havas ne ununuron, sed plurajn gramatikajn karakterojn. Ekzistas alia teorio, starigita de Ĉefeĉ — anglo, subtenita de Paul Nylen — svedo, kiu neas la gramatikan karakteron ĝenerale de la esperantaj vortradikoj kaj konsideras ilin plene neŭtralaj en tiu rilato; ili dispartigas la radikojn je konkretaj kaj abstraktaj.

Reto Rossetti, konsiderante tiujn starpunktojn, faras ĝeneraligan konkludon jene: a) la esperantaj radikoj lotente posedas plurajn gramatikajn karakterojn, laŭ la asocio de la radik-ideo; b) ĉe la pliparto de la radikoj unu gramatika karaktero estas ĉefa kaj fariĝas elirpunkto por la ceteraj; c) kelkaj radikoj estas pli-malpli neŭtralaj — neniu gramatika karaktero ĉefas.

→ EKZERCOJ

1. Li estas kapabl . . . verki versojn. Li kapabl . . . verki versojn. Lia kapabl . . . verki versojn estis konata.
Vi estas atent . . . lernanto. Kiam la instruisto klarigas la novan tekston, vi atent . . . Vi aŭskultas atent . . . Via atent . . . estas granda.
2. Ĉu via jako estas butonumita?
Ĉu vi razas vin mem, aŭ vi razigas vin?
Ĉu iu el viaj konatoj (konatuloj) portaŭ nazumon?

Dudek-unua leciono

LA VOJO DE ESPERANTO

Decidite! Mi partoprenos la ĉi-jaran Universalan Esperanto-Kongreson! Mia karesata revo realiĝos. Post unu tago mi veturos, kune kun la geedzoj Petersen, al la kongresurbo. Mi estas jam en „vojaĝfebro“.

Hu, kiom da streĉa laboro dum la lastaj tagoj! Kurado de institucio al institucio, prezentado de diversaj dokumentoj por ricevi pasporton, por vizigi ĝin ĉe kelkaj legacioj, por akiri valuton . . .

Fine ĉio estas jam aranĝita. Hodiaŭ je la 5-a horo posttagmeze la lasta subskribo estis metita sur la lasta dokumento.

Laca, sed feliĉa, mi eniras bierejan ĝardenon, kie min atendas miaj amikoj: geedzoj Petersen, Marko, Georgo kaj mia fratino. Mi rapide malkovras ilin sidantajn ĉe tablo, en stre a konversacio, kio estas videbla el la gestoj de la parolanta Petersen kaj el la mienoj de la aŭskultantoj. Mia veno interrompas la konversacion. Post la kutimaj salutoj mi informas ilin rapide kaj per malmultaj vortoj, ke ĉio estas jam en ordo. Marko estas iom malspacienca kaj turnas sin akcele al Petersen: „Nu, daŭrigu viajn pensojn . . .“ kaj al mi li klarigas mallonge: „Temas pri la ĝisnuna vojo de Esperanto“.

Petersen rekomencas la interromptan paroladon:

— Jes, mi ripetas: antaŭ la unuaj adektoj de Esperanto malfermiĝis du vojoj: aŭ akcepti la elementojn, donitajn en la Zamenhofa sistemo, kiel definitivajn kaj komenci uzi la lingvon, aŭ okupi sin pri ilia taŭgeco kaj serĉi pliperfektigon de la sistemo. La unua vojo signifis: akceptante definitivan fundamenton de la lingvo, vivi tiun materialon per uzado kaj tiamaniere krei el ĝiaj elementoj bonajn, klarajn esprimojn, krei fizionomion kaj spiriton de la internacia lingvo. La dua vojo signifus: senĉesaj teoriaj, kabinetaj esploroj, provoj per aliigoj de la elementoj krei ion ankoraŭ pli perfektan — unuvorte por tiuj adektoj la sistemo donita de Zamenhof estis nur projekto, elira punkto por plua serĉado de internacia lingvo . . .

— Ĉu do estis ankaŭ tiaj? — demandis Georgo, kiu tre atente sekvis la parolojn de Petersen.

— Jes. Kaj tiaj neniam mankis, kvankam malmultaj. Tamen mi devas memori al vi, ke fakte Zamenhof mem estis jam pasinta la duan vojon: antaŭ ol prezenti al la mondo sian sistemon, li dum multaj jaroj provis la taŭgecon de la diversaj elementoj de sia sistemo, interŝanĝadis iujn el ili, aliigadis iujn finaĵojn, iujn afiksojn, por atingi la plej praktikajn kaj trafajn. Ĉu vi legis la faman „Letero pri la deveno de Esperanto“?

Pruviĝis, ke nur Marko estas jam leginta tiun ĉi leteron. Petersen daŭrigis:



— En la unuaj jaroj de Esperanto Zamenhof ricevis el multaj flankoj proponojn pri ŝanĝoj en la ĵus ekvivinta lingvo. Li ne povis sola decidi pri tiaj ŝanĝoj: ja li estis jam rezigninta siajn aŭtorajn rajtojn pri la lingvo kaj estis deklarinta, ke ĝi apartenas al ĉiuj ĝiaj adeptoj, al la homaro. Kion li faris? La proponoj estis sistemigitaj kaj prezentitaj de li mem por voĉdonado al ĉiuj tiamaj esperantistoj. Rezulte de tiu ĉi voĉdonado la granda plimulto decide malakceptis ĉiajn ŝanĝojn. Tre prudente la malmultnombra tiam esperantistaro elektis senhezite la unuan vojon — kaj ne eraris! Saman prudenton manifestis la esperantistaro ankaŭ post multaj jaroj, en 1907, kiam ĝi malakceptis la reformojn proponitajn de Ido. Tiel, per praktika aplikado, Esperanto evoluis, perfektigis siajn eblojn de esprimado per la havataj elementoj, kreis sian propran fizionomion.

Marko rimarkigas:

— Nun mi vidas en nova lumo la sencon de la decido de la Unua Universala Esperanto-Kongreso pri la netuŝebleco de la Fundamento de Esperanto.

— Jes — konkludis Petersen, — dank' al tio ni jam fakte posedas internacian lingvon. kaj ni povas hodiaŭ esti kune, konversaci amike kaj interkompreni nin facile kaj perfekte en ĝi.

" * " "

Tra densa mallumo briletas la celo

al kiu kuraĝe ni iras.

Simile al stelo en nokta ĉielo

al ni la direkton ĝi diras.

Kaj nin ne tmgas la noktaj fantomoj.

nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj,

ĉar rekta kaj klara kaj tre difinita

ĝi estas la voj' elektita.

(L. L. Zamenhof — La Vojo)

LA VERBA SISTEMO DE ESPERANTO

Per siaj elementoj Esperanto donas eblon esprimi diversajn signifojn kaj nuancojn de ago aŭ stato rilate al la momento (tempo) de la faro aŭ esto, probableco, dezirindeco, momenteco aŭ daŭreco, unufojeco aŭ plurfojeco, finiteco aŭ nefiniteco, tempa rilato inter agoj, kiuj okazas samtempe, aŭ el kiuj unu okazas antaŭ la alia. La diversaj naciaj lingvoj atingas tion per diversaj manieroj. En Esperanto, krom la gramatikaj finaĵoj (**as, is, os, us, u**), por esprimo de tiaj signifoj servas: iuj afiksoj (ek, ad, re, el, fin, i, z k.a.), la verbo **esti** en kombino kun participoj, iuj adverboj (jam, ĵus, ĉiam, ordinaro, ĉiutage ktp.), kaj la **kunteksto**, kiu donas definitivan signifon de la vortoj. Ofte la apliko de iu aŭ alia maniero dependas de la interna senco, kiun havas la verbo: ĉu ĝi entenas ideon pri ago kiu efektiviĝas ĝis fina rezulto (elĉerpa ago), ekz. perdi, levi, konkludi ktp., aŭ daŭrecon sen esprimo de rezult-atingo, ekz. pensi, admiri, mediti, kuŝi ktp. Komparu: Mi longe **pensis**, sed nenion **elpensis**. Same: mangi — formangi; legi — ellegi — tralegi.

Speciale pri la uzado de la participoj **-ata** kaj **-ita** relegu la klarigojn donitajn en leciono 13, Notoj, punkto 2. Krome, analizu la frazojn en la jena leciono 21-a: „Hodiaŭ je la 5-a horo posttagmeze la lasta subskribo **estis metita** sur la lasta dokumento" kaj „La proponoj **estis sistemigitaj kaj prezentitaj** de li mem por voĉdonado..."

Ripete: **-ata** entenas en si ideon pri daŭreco de farata ago; **-ita** entenas ideon pri jam farita ago kaj ankaŭ pri komplete plenumita ago. Rilate al pasinta momento, pri kiu ni parolas, la formo **estis -ita** povas havi du signifojn: a) ke la ago en tiu momento jam estis farita (antaŭe), b) ke en tiu momento ĝi estis ne nur farata, sed ankaŭ venis en staton de io komplete plenumita (estiĝis ĝuste tiam plene farita)¹.

¹ Kelkaj esperantistoj preferas en tiu ĉi kazo la formon **estis -ata** („je la 5-a horo la lasta subskribo **estis metata**"); tia praktiko ne estas konforma al la Zamenhofa uzado, speciale en la **Fundamento de Esperanto** (Ekzercaro).

Memoru: ne ĉiuj reguloj de via nacia lingvo povas esti aplikataj ĉe la uzado de la gramatikaj formoj en Esperanto. Esperanto sekvas sian propran logikon.

Ekzercoj

Kompletigu la lasitajn sen finaĵo vortojn en la sekvantaj frazoj:

1. Post longa intertraktado, dum kiu estis pritaks . . . ¹ la proponoj kaj la kontraŭproponoj de la du partioj, hieraŭ je la 12-a horo fine la definitiva vorto estis dir . . . , la interkonsento ating . . . kaj la kontrakto subskrib . . .

2. Kiam mi venis en la ĉambron, la kontrakto estis subskrib . . .

3. Difinu la diferencon inter la signifoj, se en la 2-a frazo ni uzus **subskribata** aŭ **subskribita**.

¹ Ni povus diri *pritaksataj*, se ni direktas la penson precipe al la ago mem (al la procedo de pritaksado), aŭ *pritaksitaj*, se ni deziras emfazi la rezultan staton de la pritaksado.

KORA KAJ INDA CELEBRADO

La bulgara esperantistaro kreis belan tradicion — celebri siajn famajn veteranojn.

La jaroj delonge arĝentumis iliajn hararojn, sed la koroj restis junaj, plenigataj de amo al sia nevelkanta idealo: „Per Esperanto al internacia interkompreniĝo, amikeco kaj solidareco“.

Majo 1963. Grava lundo-tago de la Sofia esperantistaro — oni celebris la malnovan esperantiston **Stefan Minkov** — lian 84-an datrevenon kaj samtempe 63-jaran agadon de Esperanto.

La salono estas plenplena. La komitatanoj okupas siajn lokojn. En la centro, inter ili, estas Stefan Minkov. Honoran lokon ankaŭ okupas s-ro G. Pompilio, konstanta kongresa sekretario de UEA. La prezidanto de la Sofia esperanta societo „M. Gorkij“, Nano Nanov, malfermis la kunvenon.

Pri la jubileulo raportis Canko Murgin. Interalie li diris:

„La esperantista agado de Stefan Minkov komenciĝas en la fruaj jaroj de la nuna jarcento. Apenaŭ deksepjara li aliĝas al Esperanto-movado. Li studis la maran maŝin-lernejon kaj kiel maristo-teknikisto li multajn jarojn vojaĝis per ŝipoj kaj vizitis diversajn landojn, kie li ĉiam uzis Esperanton. Li estis fidele kunbatalanto de Zamenhof, kiun li renkontis dum la 3-a Universala Kongreso de Esperanto en Kembrigo dum 1907. En 1914—15 li estas sekretario de Bulgara Esperantista Societo. En 1920—21 li denove estas sekretario. Li aktive partoprenis en la redaktado de „Bulgara Esperantisto“. En 1921 li preparis peton por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Li estis delegito de UEA. Li deklaris la nombron de la societanoj. Li multe kontribuis pri la enkonduko de Esperanto en niaj lernejoj. Li estas unu el la fondintoj de la esperantista kooperativo. Dum sia tuta vivo li neniam forlasis la batalon por disvastigo de Esperanto kaj sindone laboris por ĝi. Li malfermis kaj gvidis multajn kursojn de Esperanto, kiel en nia lando, tiel ankaŭ fremdlande“.

Post la raporto al la jubileulo estis direktitaj gratuloj, bondeziroj kaj estis faritaj al li diversaj donacoj.

La jubileulo Stefan Minkov rakontis rememorojn pri siaj renkontiĝoj kun L. L. Zamenhof, al kiu li fariĝis fidele kunbatalanto. La kunveno tre kore akceptis la sciigon de la jubileulo pri lia persona renkontiĝo en Jasna

KONGRESO KAJ GAZETARO

La kongreso estas grava okazaĵo en la vivo de ĉiu organizaĵo. Sed la universalaj kongresoj de Esperanto havas specifan gravecon por la movado. En la kongreso oni ne nur praktike aplikas la lingvon por la interhoma kompreniĝo, sed ĝi, la kongreso, estas impona manifestiĝo de la esperantista movado. La gazetaro estas tiu granda kaj organizita forto, kiu respegulas la eventojn en la mondo, kiuj okazas en la diversaj partoj de la terglobo.

Ni volas substreki la fakton, ke la gazetara servo, en kiu partoprenis multaj esperantistaj ĵurnalistoj, sub la gvidado de Marinko Ĝivoje kaj Ivan Keremidĉiev, laboris energie, kaj ĝi sukcesis respeguli bone la kongreson mem kaj ĉiujn ĝiajn branĉojn. Ni ne havas eblecon citi ĉiujn ĵurnalojn kiuj aperigis artikolojn aŭ informojn pri la kongreso. Ni citos nur la plej interesajn kaj karakterizajn.

La plej granda kaj amase disvastigata ĵurnalo „**Rabotniĉesko delo**“ larĝe malfermis siajn paĝojn kaj informis la socion pri la 19-a junulara kongreso en Vraca, la plej amase vizitata ĝis nun esperantista junulara kongreso, pri la 48-a Universala Kongreso de Esperanto, la plej multnombra kongreso post la dua mondmilito. Krom tio la ĵurnalo substrekis la du karakterizaĵojn de la kongreso — por unua fojo post la dua mondmilito la kongreso estas vizitata de sovetiaj kaj mongolaj esperantistoj, kaj ankaŭ de esperantistoj el la nove-liberigitaj landoj en Afriko—Nigerio, Malio, Gvineo k. a. La ĵurnalo detale informis pri la gazetara konferenco, kiun gvidis la vicprezidanto de la Asocio de la bulgaraj ĵurnalistoj Ilija Kjulovski kaj en kiu parolis la prezidanto de UEA Prof. D-ro Hideo Jagi, la Direktorino de CO de UEA f-ino M. Vermaas, Kiril Drajev pri la Dua Internacia Arta Festivalo. La ĵurnalo publikigis longan artikolon kun titolo en Esperanto „Rezultodonan laboron, geesperantistoj!“ en kiu estas substrekita la fakto, ke nia tuta socio rilatas kun granda intereso al la kongreso kaj ĝiaj elmontriĝoj.

Al la malfermo de la Kongreso la ĵurnalo dediĉis grandan spacon sur la unua paĝo kun portreto de G. Trajkov, la unua Vicĉefministro de PR Bulgario kaj Honora protektanto de la Kongreso, kaj kun bildo de parto de la partoprenintoj en la Kongreso. La ĵurnalo publikigis la salutparolon de la unua vicĉefministro, ĝi donis informon pri la III Konferenco de MEM, pri la malfermo de la Somera Universitato, pri la 33-a Kongreso de la blindaj esperantistoj, pri la Bulgara Arta Vespero k. a. En aliaj siaj numeroj la ĵurnalo publikigis informojn pri la akcepto, kiun donis al la gekongresanoj la urbestro, pri

Daŭrigo de paĝo 26.

Poljana (Ruslando) kun la fama rusa verkisto L. Tolstoj, kiun li salutis esperante per la vortoj — „Bonan tagon!“ — „Bonan tagon!“ — respondis ankaŭ la verkisto, same en Esperanto. Neforgesebla renkontiĝo! . . .

Fine Stefan Minkov dankis al ĉiuj, kiuj salutis lin.

Ivan Draganov

la jarkunveno de TEĴA, pri la fakkunsidoj de instruistoj, kuracistoj, juristoj, agronomoj, virinoj-esperantistinoj, pri la diversaj konkursoj (oratora, pri deklamado k. a.), pri la junulara Balo, pri la kunvenoj de UEA, pri la Internacia Arta Vespero, pri la Internacia Balo k. a. Longa estis ankaŭ la informo pri la solena fermo de la Kongreso.

Ĵurnalo „**Oteĉestven Front**“ ankaŭ malfermis siajn pagojn kaj donis interesajn artikolojn kaj informojn kun trafikaj titoloj: „Esperanto—rimedo por interkonatiĝo de la popoloj“, „Fruktodonan agadon, esperantistoj!“, „Sub la signo de la amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj“, „Hodiaŭ estos fermita la 48-a Kongreso de Esperanto“ k. a.

Ankaŭ la ĵurnalo „**Narodna Mladej**“ publikigis interesajn materialojn dediĉitajn al la kongreso: „Ĉin unuigas la strebo al paco kaj amikeco“ kun bildo de la parto de la kongresanoj, „Sukcesa laboro en la nomo de la paco kaj amikeco“, „La Kongreso de la esperantistoj — agadkampo por kultura interŝanĝo“ — kun bildo de la Fotokonkurso — Sofio de Edvard Pavlaĉka el ĈSSR, k. a.

Ĵurnalo „**Zemedelsko Zname**“ dediĉis specialan informon al la 48-a Universala Kongreso kaj al la 8-a Internacia Infana Kongreseto.

Al la 8-a Infana Kongreseto dediĉis informon ankaŭ la ĵurnalo „**Narodna Mladej**“.

Ĵurnalo „**Trud**“ dediĉis artikolojn kaj informojn al la 19-a junulara kongreso, al la 48-a Universala Kongreso — kongreso sen tradukistoj!

Ĵurnalo „**Kooperativno selo**“ publikigis ankaŭ interesajn artikolojn: „Fruktodonan laboron, esperantistoj!“, „Varia agado en la kongreso de la esperantistoj“, k. a.

Ĵurnalo „**Veĉerni Novini**“ dediĉis artikolojn al la kultura agado de la esperantistoj: „La internacia Arta Esperanto-Teatro“, „La bulgara Esperanto-Teatro, Belaj estradaj vesperoj de la amikeco kun bildoj de skota muzikisto, de japana flutisto, de pola estrado-trio, de bulgara danca ensemblo, k. a.

La ĵurnalo „**Naroden Sport**“ publikigis informon „Renkontiĝo de la esperantistoj-ŝakistoj“ kun bildo.

La ĵurnalo „**Zdraven Front**“ publikigis intervjuon kun Prof. D-ro Hideo Jagi kun titolo „Potenco batalilo por interproksimiĝo de la homoj“ kun portreto de Prof. Jagi kaj informon „Kongreso de la amikeco“.

Interesaj artikoloj pri la kongresaj aferoj aperis ankaŭ en la ĵurnaloj „**Literaturen Front**“, „**Narodna Kultura**“ k. a., en diversaj provincaj ĵurnaloj, sed nun ne estus eble citi ĉiujn. Grava fakto estas ke la ĉefurba gazetaro larĝe informis la socion pri la kongreso. Tiun bonan ekzemplon devas postsekvi ĉiuj estontaj Esperanto-Kongresoj!

DEKORACIITAJ ESPERANTISTOJ

La Prezidentaro de la Parlamento dekoraciis per ordeno „9-a de Septembro“ pro ilia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo kaj en la konstruo de la socialismo la esperantistojn:

1. Atanas Lakov Petkov, vicprezidanto de BEA, — dua grado.
2. Grigor Georgiev Jeljavski — tria grado.

AL LA MALNOVAJ ESPERANTISTOJ

(Malfermita letero)

La aperigo de la unua lernolibro de Esperanto fare de D-ro L. L. Zamenhof en 1887 havis tujreehon en nia lando. Rezulte de tio antaŭ 75 jaroj la unuaj bulgaraj esperantistoj fondis Esperantistan Klubon en Sofio, aperigis la duan en la mondo esperantistan gazeton kaj transdonis al la presejo la manuskripton de Esperanto-lernolibro. Tiam ankaŭ aperis deko da artikoloj en la bulgarlingvaj ĵurnaloj, per kio oni konigis la esperantistan aferon al la bulgara popolo. Do 1889 estas historia jaro por la bulgara esperantista movado. Ni devas organizi festojn tiun jubileon.

„Bulgara Esperantisto“ volonte aperigos historiajn studojn, rememorojn de veteranoj kaj aktivuloj pri la esperantista agado dum la pasintaj jaroj. Por fari konsiderindan kontribuon al la historio de nia movado oni bezonas sufiĉe da tempo kaj la kunigon de la laboro de multaj esperantistoj. Jen pro kio, ni atentigas antaŭ ĉio la malnovajn esperantistojn kaj aktivulojn dediĉi iom da tempo kaj fortoj al tiu neprokrastebla afero.

La geesperantistoj kiuj deziras kunlabori en tiu senco estas petataj skribi al ni poŝtkarton por ke ni povu plani kaj direkti la aferon. Estas dezirinde, ke ĉiu verku sian artikolon tiel kiel li memoras aŭ dokumentu per tio, kion li posedas aŭ konas. Por ke la artikoloj estu interesaj oni devas zorgi prilabori la kolektitajn faktojn. Se iu ne emas verki artikolon, sed havas iajn dokumentojn (manuskriptojn de prelegoj kaj raportoj, protokoloj, malnovaj libroj, gazetoj kaj fotoj) aŭ konas gravajn nekonatajn ĝis nun faktojn li estas petata sciigi ilin al ni por ke ni utiligu ilin kompletigante la artikolojn de aliaj kunlaborantoj. En konvena loko tamen ni mencias nepre kiu havigis al ni la koncernan materialon el la historio de nia landa Esp.-movado.

Karaj veteranoj kaj aktivuloj,

Pripensu serioze per kio vi povus kontribui. Ne malatentu nian alvokon. La jaroj forkuras rapide kaj la novaj generacioj sen via helpo neniam havos kompletan kaj fidindan informon pri la epoko dum kiu vi aktive agadis.

Karaj gejunuloj,

Tiu ĉi letero estas adresita ankaŭ al vi. Kiu el vi ankoraŭ ne havas esperantan taglibron ekde nun devas enkonduki tian en sia ĉiutaga vivo. En ĝi registru ĉiun pli gravan okazintaĵon el via esperantista vivo. Tiuj materialoj nun ŝajnas al vi ordinaraj, sed venos tempo kiam amasiĝos multe da materialoj kaj tute certe inter ili estos ankaŭ tre valoraj eroj. Tamen antaŭ ol registri la unuajn faktojn bonvolu kolekti kaj resumi la informojn pri la Esperanto-agado en via loĝloko en la pasintaj jaroj. Restarigu koncize la biografiojn de la plej konataj aktivuloj de nia movado. Se iuj el ili ankoraŭ vivas instigu ilin en amika interparolo ke ili rakontu al vi kaj poste vi mem fiksus en vian taglibron tion, kion vi eksciis kaj sendu ĝin al ni.

La estraroj de la Esp.-societoj specialan atenton direktu al la verko de la protokoloj de la kunvenoj. Ili devas bone respiguli la esperantistan vivon, entenante ne nur decidojn, sed ankaŭ iujn interesajn opiniojn kaj proponojn.

ADRESARO DE LA ESPERANTO-SOCIETOJ EN BULGARIO

(daŭrigo de kajero 7)

DISTRIKTO DE MIHAJLOVGRAD

1. BERKOVICA, E. s-to „Verda Stelo“ (per adv. Dim. Kirov)
- ~~2. vil. VLADIMIROVO (Mihajlovgr.), E. s-to „L. L. Zamenhof“ (per Iv. Al. Atanasov)~~
3. vil. LEHČEVO (Mihajlovgr.), E. s-to „Pacdefendanto“
4. LOM, E. s-to „Espero“, str. G. Karastojanov* 18 (per Har. Tončev)
5. MIHAJLOVGRAD, E. s-to „Septembra Gloro“, G. Dimitrov 82 (per As. Penkov)

DISTRIKTO DE PAZARĜIK

1. vil. BATAK (Pazarĝik), E. s-to „P. Toškov“
2. VELINGRAD, E. s-to „Stoju Kalpazanov“ (per Manol Colvej)
3. PAZARĜIK, E. s-to „Radio“, str. Plovdivska 41
4. PANAGJURIŠTE, E. s-to „Nova Stelo“, str. Koĝabačev 7 (per N. Lambov)
5. PEŠTERA, E. s-to „Nova epoko“
6. SEPTEMVRI—garata, E. s-to „Aŭroro“ (per Al. Gerasimov)

DISTRIKTO DE PERNIK

- ~~1. BREZNIK, E. s-to „Aŭroro de la komunismo“ (per Andrej Germanov)~~
2. PERNIK, E. s-to „Nova vojo“, P. K. 81

DISTRIKTO DE PLEVEN

1. vil. BEGLEJ (Pleven), E. s-to „Aŭroro“ (per Iv. Jelezarov)
2. LEVSKI, E. s-to „Trumpetisto“, str. V. Levski 4-a (per Jordan Angelov)
3. NIKOPOL, E. s-to „Petko Simeonov“ (per Todor Jan'ev)
4. PLEVEN, E. s-to „Eterna Amikeco“, str. P. Beron 6, kv. 2 (per Zdr. Velikov)
5. vil. PORDIM (Pleven), E. s-to „Verda Stelo“

DISTRIKTO DE PLOVDIV

1. ASENOVGRAD, E. s-to „David Sasonov“, str. Dičo Petrov 14
2. vil. BELOZEM (Plovdiv), E. s-to (per St. Boikliev)
3. vil. BOGDAN (Plovdiv), E. s-to „Fajrero“ (per Iv. Kr. Dečev)
4. vil. BRACIGOVO (Plovdiv), E. s-to „Nikola Mišev-Kamarado“ (per Ĥr. Mijorkov)

5. ⁵³¹⁰⁷VAZOVGRAD, E. s-to „Pachatalanto“, str. Ĥr. Maĝarov 23 (per Ivanka Maĝarova)
6. vil. GORNI DOMLJAN (Plovdiv), E. s-to „Paco“ (per Văljo Vălev)
 7. KLISURA, E. s-to „Kolombo de la Paco“ (per Stanka Laleva)
 8. KARLOVO, E. s-to „V. Leyski“, ul. 27 dekmvri 10 (per ~~Cv. Cvetkov~~ *Boj. de Leonov*)
 9. Gara KRIČIM (Plovdiv), E. s-to „Zamenhof“, str. Ĥr. Botev 52 (per Ivan Banski)
 10. PLOVDIV, E. s-to „Kulturo“, p. k. 151
 11. PLOVDIV, E. s-to „Studenta Impeto“, p. k. 151
 12. vil. PROLOM (Plovdiv), E. s-to „Printempo“ (per Nanju Gančev)
 13. vil. PROSLAV (Plovdiv), E. s-to „Paco“, str. D-ro Zamenhof 8
 14. PĀRVOMAJ, E. s-to „D-ro Zamenhof“ *PK*
 15. vil. ROZINO (Plovdiv), E. s-to „Stelo de la Paco“ (per Georgi Arnaudov)
 16. vil. RÂJEVO KONARE (Plovdiv), E. s-to „Brila Stelo“ (per St. Darĵonov)
 17. vil. TRUD (Plovdiv), E. s-to „Paco“ (per Alek. Plačkov)

DISTRIKTO DE RAZGRAD

1. ISPERIH, E. s-to „Stelo de Ludogorie“, str. V. Kolarov 12 (per P. Stanev)
2. KUBRAT, E. s-to „Progreso“
3. RAZGRAD, E. s-to „L. L. Zamenhof“, str. P. Beron 28 (per P. Nedelčev)
4. vil. SVEŠTARE, E. s-to „Paco“ (per Dimitr N. Čardakliev)

DISTRIKTO DE RUSE

1. vil. BOROVO, E. s-to „Lumo“ (per Marin Bărdarov)
2. BJALA, E. s-to „Paco“
3. vil. DVE MOGILI, E. s-to
4. RUSE, E. s-to „Danuba Studento“-IMESS
5. RUSE, E. s-to „Libero“, str. 9 Septemvri 98
6. RUSE, E. s-to „Ponto de l' Amikeco“, p. k. 1
7. RUSE, E. s-to „Dimitrovec“, str. G. Dimitrov 120, p. k. 14 (per Ĥ. Iv. Ĥristov)
8. vil. ŠTRÂKLEVO (Ruse), E. s-to „Pachatalanto“

DISTRIKTO DE SILISTRA

1. SILISTRA, E. s-to, str. Ĥaĝi Dimitr 54 (per Evl. Šikov)

30 Distrikta Esp.-komitato
Plovdiv, P.K. 184 10/11/18

☆

DISTRIKTO DE SLIVEN

1. vil. KAMENOV (Sliven), E. s-to „Zagora Esperantisto“ (per Iv. Dim. Ivanov)
2. NOVA ZAGORA, E. s-to „Edmond Privat“, str. G. Dimitrov 121 (per Nedelčo Dimitrov)
3. SLIVEN, E. s-to „Espero“, str. L. Tolstoj 4 (per Ĉ. Kantargiev)

DISTRIKTO DE SMOLJAN

1. MADAN, E. s-to „Nova Mondo“ (per Nikola Stranganski)
2. RAJKOVO, E. s-to (per Dim. Pašov)
3. SMOLJAN, E. s-to „Kulturo“ (per Strasiimir Spasov)

DISTRIKTO DE SOFIA

1. BANKJA, E. s-to „Solidareco“, Dom na ŝaprotivata (per Iv. Rankov)
2. BOTEVGRAD, E. s-to „Botev“, str. Preslav 18 (per Mitrofan Velev)
3. ~~BUĤOVO, E. s-to „Komsomola Solidareco“, Kulturen Dom~~
4. vil. GOVEDARCI, E. s-to „Tutmonda Paco“, (per Levtera Duhalova)
5. ETROPOLE, E. s-to „Kamaradeco“ (per Petko Palikarov)
6. SAMOKOV, E. s-to „Rila Esperantisto“, Uĉiliste „9 Septemvri“ (per Nikola Moskovski)
7. SOFIA, s-to „Aŭtotransporto“, str. Ĥr. Miĥajlov 8-a
8. SOFIA, Fervojista Esperanto-s-to „Prospero“, p. k. 386
9. SOFIA, E. s-to „Maksim Gorkij“, p. k. 44
10. SOFIA, E. s-to (poŝtista) „Heroldo“, p. k. 25.
11. SOFIA, E. s-to „48-a UK“, p. k. 435
12. SOFIA, E. s-to „Balkana Stelo“, Slavejkov 1
13. SOFIA, Studenta E. s-to „Vela Peeva“, p. k. 587
14. SOFIA, E. s-to „Printempo“, Tramvajno depo „St. Vasilev“

DISTRIKTO DE STARA ZAGORA

1. vil. VETREN (St. Zagora), E. s-to „G. Dimitrov“ (per Trifon Postalev)
2. vil. GABAREVO (St. Zagora), E. s-to „D-ro Zamenhof“ (per Stefanka Nestorova)
3. vil. GORNO SAHRANE (St. Zagora) E. s-to „Gen. Radojnov“ (per Tenjo Nanev)
4. vil. DĀLBOKI (St. Zagora), E. s-to „Marko Ivanov“ (per Bojĉo Damjanov)
5. KAZANLĀK, E. s-to „Roza valo“
6. vil. MĀGLIJ (St. Zagora), E. s-to Septembra Gloro“ (per Vārban Kalĉev)
7. STARA ZAGORA, E. s-to „Verda Stelo“, str. Rakovski 130
8. vil. TROJANOV (St. Zagora), E. s-to „Espero“ (per G. Marinkov — Ministroj)

9. vil. TĀĴA (St. Zagora), E. s-to „Ruĝa Stelo“ (per Todor Ganarov)
10. vil. HAĜI DIMITROVO (St. Zagora), E. s-to „Denju Ivanov“
11. ĈIRPAN, E. s-to Mondamikeco“, zavod „Bādāŝnost“ (per Ŝoparov)
12. vil. ŜIPKA, E. s-to „Ŝipka“ (per Dim. G. Stanev)

DISTRIKTO DE TOLBUĤIN

1. vil. SMOLNICA, Esperanto s-to
2. TOLBUĤIN, E. s-to „Paco“, str. D. Grujev 17 (per D. Kruŝev)

DISTRIKTO DE TĀRGOVIŜTE

1. POPOVO, E. s-to „Homeco“ (per Il. Mirĉev)
2. TĀRGOVIŜTE, E. s-to „Verda Eskadrono“ str. Marica 10 (per Ivan Ivanov)

DISTRIKTO DE TĀRNOVO

1. GORNA ORJAĤOVICA, E. s-to „Espero“, str. Radecki 7 (per Iv. Ĝipov)
2. GARA GORNA ORJAĤOVICA, E. s-to „Mondlingvo“ (per N. N. Stojkov, finansov otel)
3. PAVLIKENI, E. s-to (per Veliĉka Geŝeva — poŝtata)
4. vil. POLSKI TRĀMBEŜ, E. s-to „Sukceso“
5. vil. RADANOV, E. s-to „Aŭroro“
6. SVIŜTOV, E. s-to „Danuba Stelo“, str. Stara Planina 20 (per Raf. Pāŝev)
7. SVIŜTOV, Studenta Esperanto s-to, str. P. Parĉev ĉ 5 (per Iv. Aleksiev)
8. TĀRNOVO, E. s-to „Lumo“, str. Iv. Parnov 2

DISTRIKTO DE ĤASKOVO

1. DIMITROVGRAD, E. s-to „Internacia Amikeco“, str. Gen. Gurko 15 (per V. Vālĉanov)
2. DIMITROVGRAD, E. s-to „Paco“, „Marbas“
3. DIMITROVGRAD, E. s-to „Flamo“, Ĥimkombinat
4. vil. LJUBIMEC (Ĥaskovo), E. s-to „Ruĝa Stelo“, str. Sofia 13 (per Zdravko Varnov)
5. SVILENGRAD, E. s-to „Nova Mondo“, str. Makarenko 15 (per Dimĉo Gilinov)
7. HARMANLI, E. s-to „Sukceso“, str. Levski 67 (per K. Vālev)
8. ĤASKOVO, E. s-to „Asen Zlatarov“, str. Dobruĝa 23 (per G. Idakiev)

DISTRIKTO DE JAMBOL

1. ELĤOVO, E. s-to „Traca Stelo“, str. Belgrad 18 (per eljazko Nenov)
2. JAMBOL, s-to „Maksim Gorkij“, p. k. 25
3. vil. ZIMNICA (Jambol), E. s-to „Amikeco“

POSTKONGRESA LABORO EN LOVEĈ

La okazigo de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio estas grava evento por ĉiuj bulgaraj esperantistoj. Tion ni bone komprenas kaj ni plifortigas nian laboron. La esperantistoj en Loveĉ turnis sin al la Plenumkomitato de l' Urba Konsilantaro por ke unu el la stratoj de Loveĉ honore al la 48-a UEK estu nomita „Esperanto“. La Plenumkomitato decidis kaj nomis la belan straton „Sofijska“ — „Esperanto“.

Ni ĝoje renkontis la decidon kaj promesis labori pli energie por paco kaj amikeco inter la popoloj en la mondo.

St. Fortunov

IMITINDA LABORO

... Ĉiujare en multaj universitataj urboj tra la mondo okazas universitataj kursoj pri la Internacia Lingvo Esperanto, kaj en pluraj lokoj universitataj instruistoj speciale ŝarĝitaj pri la lingvo prizorgas la instruadon. Tamen nur malofte la internacieco de Esperanto estas tiel palpeble montrita kiel en la universitata kurso en Zagrebo, kie studentoj el Birmo, Indonezio, Libano, Sirio, Israelo, Irako, Jordanio, Sudano, Tanganiko, Malio, Unuiĝinta Araba Respubliko, Kubo, Bolivio kaj Ĉilio partoprenas rektmetodan kurson de la Internacia Lingvo.

Inter studentinoj



— Vi ne povas imagi, Mimi, kiom da kolegoj freneze amas min.
Sufiĉas, ke vi imagas tion.

MONTODOMO „ESPERANTO“

Dankante al la kontribuantoj ni kvitanças la jenajn sumojn: Bulgara Turista Asocio, Sofio — 1,000 lv.; E.-societo „Pirin-Montaro“, Bansko — 20 lv.; E.-societo „Libero“, Ruse — 20 lv.; E.-societo „Razmetanica“, vil. Panĉarevo (Kjstendila distr.) — 15 lv.; E.-societo „Kulturo“, Plovdiv — 15 lv.; E.-societo „Sukceso“, Vratca — 10 lv.; s-ro Glaŭko Pompilio, Roterdamo — 5 lv.; Hans Vankmuler, Munkeno — 5 lv.; Hristo Paškulev, Karlovo — 5 lv.; Ru kaj Katrin Busong, Nederlando — 6 lv.

Paginte la fiksitan sumon fariĝis fondintoj de la montodomo: Bulgara Turista Asocio, Hans Vankmuler kaj Hristo Paškulev — fakdelegitoj pri alpismo.

TURISTA SEKCIO „ESPERANTO“

Poŝtkesto 44, Sofio

Humorajoj

Du pacientoj en la ĥirurga fako de la hospitalo, solide vinditaj, interparolas.

— Kio okazis al vi?

— Mia edzino insistis ke mi aĉetu por ni aŭton. Tamen mi ne konsentis...

Kaj vi?

— Mi konsentis.

*

Rakontante pri sia infanaĝo la milionulo diris:

— Tiutempe mi revis estiĝi rabisto.

En tiu momento juna sinjorino rapide kaj senĝene aldonis:

— Kaj vi sukcesis!...

*

Kelkajn semajnojn post la nupto la edzo parolas al sia edzino pri la familia moralo, klarigante ke ŝi devas resti fidela!

— Dio mia! — ekkriis la edzino. — Apenaŭ nun vi faras al mi tian averton...

*

Cirkulas onidiroj, ke vi kruele batas vian filon.

— Jes, dum memdefendo.

*

— Ĉu vi kredas, ke la viroj estas pli diskretaj ol la virinoj?

— Neeble.

— Jes, jes! Mi konas sinjoron, kiu ricevis altigon de sia salajro antaŭ kelkaj monatoj, kaj ĝis nun li nenion diris al sia edzino.

*

La vero ĉiam belaspektas, eĉ estante nuda.

*



JUGOSLAVIO

Milić Mirjana, studentino, **Svilanac**, Dragoševa 14, Srbija, interesigas pri opera muziko kaj aliaj temoj.

POLLANDO

Mieczysław Kwietniewski, Ostrowy Gornicze, Odwodowa 10, poczta: Kazimierz Sosnowiecki, pow. Bedzin d. t. kaj b. k.

Wiesław Beyrowski (25-jara), p. k. 37, **Leborc** — kun bulgaroj; Pl, alumetetiketoj.

F-ino Banbura Cevylia (21-jara instruistino), **Rudawa**, Szkoła podstawowa Brzostkwinia, woj. Krak.

F-ino Pawlikowska Emilia (20-jara instruistino), **Rudawa**, Szkoła Podstawowa, woj. Krak.

F-ino Sottysik Krystyna (20-jara instruistino), **Rudawa**, Szkoła Podstawowa, woj.

S-ino Rejdych Helena (35-jara instruistino), **Trzebinia**, Szkoła Podstawowa nr. 1, woj. Krak.

K-ino Przybyło Maria (20-jara instruistino), **Libiaz**, Szkoła Podstawowa, woj. Krak.

S-ino Machura Halina (22-jara instruistino), **Chrzanow**, Szkoła Podstawowa nr. 1, woj. Krak.

S-ino Kulesza Ema (25-jara instruistino), **Chrzanow**, Szkoła Podstawowa nr. 2, woj. Krak.

F-ino Koziara Anna (20-jara instruistino), **Metkow**, Szkoła Podstawowa, pow. Chrzanow, woj. Krak.

F-ino Janeczek Marian (25-jara instruistino), **Zagorze**, Szkoła Podstawowa, pow. Chrzanow, woj. Krak.

F-ino Jarosik Emilia (40-jara bibliotekistino), **Chrzanow**, Szkoła Podstawowa nr. 3, woj. Krak.

S-ro Kilijanski Jerzy (25-jara teknikisto), **Jaworzno**, Osiedle Stale 47/17, woj. Krak.

S-ro Jablęcki Józef (23-jara teknikisto), **Jaworzno**, Bory, ul. Niemcewicz 1/11.

F-ino Wojewoda Janina (30-jara oficistino), **Oswiecim**, Zakłady Chemiczne, woj. Krak.

S-ro Szczakonski Hojciech, **Lodz** 25, ul. Starosikanska 25 m 16, radioteknikisto.

F-ino Wybudowska Urzula (26-jara oficistino), **Oswiecim**, Zakłady Chemiczne, woj. Krak.

S-ino Gorczyca Janina (26-jara instruistino), **Jaworzno**, Szkoła Podstawowa nr. 3, woj. Krak.

S-ro mag. Lodygowski Zygmunt (50-jara oficisto), **Chrzanow**, ul. 29 Listopada 7/40, woj. Krak.

S-ro Hebda Stefan (40-jara fotografisto), **Chrzanow**, Fabryka

S-ro Bungler Cezary (35-jara teknologo), Lokomotyw, woj. Krak.

F-ino Biel Krystyna (19-jara poŝtovicistino), **Chrzanow**, Poŝtoficjo.

S-ino Nina Kłodas (mezaĝa), Pabianice Orla 40, d. k. kun similaj.

USSR

Vjaceslav Rojdestvenskij, Ĉelabinskaja obl. g. Ust—Katov, do vostrebovanija — pri arto, ĵurnalismo; Pl.

Nadejda Rojdestvenskaja, Ĉelabinskaja obl. g. Ust—Katov, do vostreb., pri teatro, literaturo, kino, pionira movado, ĉio pri Majakovskij en ĉiuj landoj.

Friderik Bestujev, Ŝostka (Sumskej obl.), ul. Privokzalnaja 13/10

Gesamideanoj! Helpu en granda kaj grava laboro: kolektado de opinioj pri nia lingvo de famuloj ĉiulandaj por propagando de Esperanto kaj sendu citaĵojn pri internacia lingvo laŭ adreso:

Ivanov V. N. Ljotnaja 60, 35, Ivanovo—22.

VJETNAMIO


Dao Trong Khang (18-jara lernanto), 44 str. Nguyen-Dzu, **Hanoi** — kun komencantaj bulgaroj; PM, Pl, fotoj.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN,
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Ivan Sarafov

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82



Solena inaüguero de la Kongreso



La kongresa prezidantaro